

Bulgara Esperantisto

Majo 1990



ENHAVO

- 2 La profunda rekonstruado bezonas tempon (Nikola Aleksiev)
- 4 La bulgara socio nuntempa (Venelin Mitev)
- 5 Pri nia enketo
- 6 Antaŭuloj de Esperanto en Bulgario (Canko Murgin)
- 8 Renaskiĝo de la rumana E-movado
- 10 Pri iuj gramatikaj fenomenoj (Violin Oljanov)
- 11 Intervjuoj (Nikola Nikolov, Atanas Ilkov)
- 15 Antaŭ la 42-a kongreso de BEA
- 18 Originala verkaro (Nikolao Stranĝanski)
- 20 Beletro (Vasil Kinov)
- 24 Babilono vivas (Georgi Miĥajlov)
- 26 Kooperativa instruado en USSR (Nikolao Gudskov)
- 29 Kie, Kiam, Kio
- 30 Distroj
- III Vanga (Jose Frauzino de Souza — Brazilo)

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Kunĉo VĀLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj — 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gld.

„Bulgara Esperantisto“ havas abonantojn en 51 landoj.

Represo el „BE“ permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

REKLAMTARIFO

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
1200 gld	600 gld	300 gld	150 gld

Sur la unua kovrilpaĝo: La verda paradizo de Rodopi-montaro.
Foto: Kirilka SAVOVA

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B—2000 ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11—1105, 70084 — BRAZILIA—DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, SOUTH HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

Fédération Espérantiste du Travail, 115, Rue Béranger, F—92320 CHATILLON

Union Française pour L'Esperanto, 4 Bis, Rue de la Cerrisaie, F—75004 PARIS

IRLANDO

Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1—2415—18, TOKYO 24WA, J39

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. „Dame Gruev“ 66, YU—96000 OHRID

MEKSIKO

Leonora Torrez T., Playa Hornos 575, COL. MARTE, 08830 MÉXICO DF

Enrique Lemus, Insurgentes Sur 3493, Villa Olímpica, Edif. 27—001, 14020 MÉXICO DF

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio, Werther Sacramento, R. Dr. João Couto, 6, r/c. A, P — 1500 LISBOA

SVEDIO

Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, S—242 94 HÖRBY

SVISLANDO

Esperanto-Perantejo, Wein-gartstr. 21, CH — 3014 BERN

SUD-AFRIKO

C. S. Beckford, P. O. Box. 1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League, For North America, Inc. P. O. Box 1129, EL CERRITO, CA, 95430

Jaro 59

N-ro 5

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN
1919, DISTINGITA PER ORDENO „KIRIL I METODIJ” — I GRADO**

ANTAŬ LA 42-A KONGRESO DE BEA

La pasioj ardiĝas

Pro alproksimiĝo de la 42-a Kongreso de BEA, kiu okazos ĉi-somere, jam ekflamis la pasioj en la Asocio. Fondiĝis grupoj, kies opinioj ne koincidas kun la oficiala pozicio pri diversaj problemoj de Esperanta agado en nia lando. (En tiu numero de „Bulgara Esperantisto” ni donas apartan lokon al la proponoj al CE de BEA de Kiril Velkov kaj Ljubomir Trifonĉovski kaj al la alvoko de la movado „Esperantistoj por vera rekonstruo” — sur paĝoj 15—17.) Pliaktivigis sian E-agadon ankaŭ apartaj membroj de nia Asocio. Kompreneble, tiu ekvigliĝo en nia medio estas rezulto de la komenciĝintaj post la 10-a de novembro 1989 demokratiaj ŝanĝoj en nia lando.

Sub la influo de tiuj procesoj kaj la premo de la formiĝinta opozicio en BEA, ankaŭ la Buroo de CE de BEA devis eklabori pli demokratie. Ilustro de tiu iom post iom ŝanĝiĝanta agmaniero estis ankaŭ la lasta kunsido de la Buroo, okazinta la 21-an de februaro j. k. Mi rapidas sciigi nian legataron pri la novaĵoj senkonsidere al la kronologio de la tagordo. La Buroo proponas al la Centra Estraro de BEA akcepti la jenajn decidojn:

● Oni eligas el la konsisto de la Buroo la sekretariojn de la komisionoj ĉe

BEA nome: Radoslav Paraŝkevov, Ivan Ĉulev, Cvetka Miteva; Jordan Angelov — etatulo de BEA en Plovdiv. La Buroo opinias, ke la posteno „ĝenerala sekretario de BEA” devas transformiĝi en postenon „sekretario de BEA”;

● La problemoj pri malgrandigo de la salajrata aparato de BEA oni devas trakti post la Kongreso;

● Ĉu BEA estonte subvenciu la eldonadon de „Paco”? Tiun demandon oni devas decidi, kiam oni preparas la asocian buĝeton por 1991.

● CE de BEA deklaras, ke ĝi ne havas negativan rilaton al SAT kaj opinias, ke ĝi povas kunlaboradi kun tiu organizo;

● Oni proponas okazigi la sekvan antaŭkongresan plenkunsidon de la CE de BEA ĉe tagordo:

— pridiskuto kaj akcepto de la kongresa raporto;

— pridiskuto de la projekto pri strategio de BEA-agado;

— pridiskuto de projekto de nova Statuto de BEA;

— pridiskuto de proponoj por konsisto de kongresaj labororganoj kaj aliaj demandoj rilate al ĝiaj sukcesaj organizo kaj okazigo.

En sia lasta kunsido la Buroo pridiskutis: la raporton pri la ekonomia agado de BEA dum 1989 kaj pri la buĝeto kaj etato de BEA dum 1990 (raportis Sava Dâlbokov); informon pri la agado de BEA post la decembra (1989) plenkunsido de CE de BEA (raportis Aleksandâr Dunĉev); bazajn tezojn por preparo de la kongresa raporto (raportis Canko Ignev): Ĉi tiujn dokumentojn mi ne traktas detale ĉar ili estos pridiskutitaj dum la plenkunsido de CE de BEA en Pazarĝik. Poste ni informos nian legantaron pri la diskutado. Estis aprobita ankaŭ komisiono por preparo de la kongresa raporto en konsisto: Sava Dâlbokov, Canko Ignev, Radoslav Paraŝkevov, Aleksandâr Dunĉev, Belka Beleva, Violin Oljanov, Georgi Miĥalkov, Dimitâr Dimitrov, Enjo Enev (Burgas), Kiril Velkov (Vraca), Kiril Popov, Maria Jankova, Nikola Nikolov, Nikola Uzunov (Ĥaskovo), Petko Arnaudov (Pazarĝik), Petâr Todorov, Fani Miĥajlova (Plovdiv), Ĥristo Manolov (Polski Trambeŝ).

La Buroo akceptis la proponon organizi reklaman standon de BEA dum la 75-a UK en Havano.

Laŭ sia propra decido pri membreco en la Buroo rezignas Dimitâr Papazov — ĝenerala sekretario de BEA kaj Maria Jankova — ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto”. Tiumaniere la Redakcio povas esti pli objektiva kaj relative sendependa, ĉar „Bulgara Esperantisto” kiel organo ne de la asocia estraro, sed de Bulgara Esperantista Asocio, estas libera tribuno por ĉiuj membroj. Tiel la revuo esprimos la plurismon kaj la buntecon de diversaj vidpunktoj kaj konceptoj. Por respondi al la galopado de vivŝanĝoj, la Redakcio per ĉiuj fortoj strebos baldaŭ mallongigi la presadperiodon de la revuo, strebante al pli da freŝeco kaj aktualeco.

La Redakcio esprimas sian pozicion plej klare, citante la grandan Voltaire: „Mi ne konsentas pri tio, kion vi diras, sed mi ĝismorte batalos por via rajto paroli tion!”.

Maria JANKOVA

LA PROFUNDA REKONSTRUADO BEZONAS TEMPON



Kiel konate, en Sovetunio kaj en la ŝtatoj de Varsovia pakto oni aktive okupiĝas pri tiel nomata „perestrojka” (rekonstruado) en ĉiuj sektoroj kaj sferoj de la socia agado.

Tute nature, simila fenomeno provokas diversajn konceptojn kaj praktikajn manierojn por la realigo de tiu tiel longe sopirata rekonstruo.

Ne estas mirige, ke oni malfacile orientiĝas kiu ideo.

propono, kritiko estas la plej konvena aŭ almenaŭ pli realigebla. Precipe komplika estas la problemaro de la rekonstruado en la spirita sfero: edukado, kulturo, arto, organizaĵoj kaj organoj funkciantaj en tiu gravega sfero.

Krom la necesa materiala bazo, la specifiko de la spirita vivo postulas ankaŭ pli longajn periodojn por efektiva vivo de jam aprobitaj ideoj, proponoj, receptoj.

Tiuj principaj pensoj validas ankaŭ por la rekonstruado de la agado de BEA.

Tiu rekonstruo estis pritraktita ne unufoje en plenkunsidoj de Centra Estraro de BEA. Oni pridiskutis diversajn opiniojn kaj proponojn en tre vigla maniero. Fine estis aprobita certa modelo kaj oni komencis praktikan laboron por ties efektivigo. Sed pro diversaj kaŭzoj, ne ĉiam dependantaj de la volo de l'esperantistaro, la kondiĉoj de reala rekonstruado en nia lando ne estis favoraj. Tiu ĝenerala atmosfero efikis negative ankaŭ je la rekonstruado de BEA. Ne ĉio el la aprobita platformo realiĝis kontentige.

Apenaŭ post la 10-a de novembro 1989 la perspektivoj tiurilate pliheliĝis. En la tuta lando ekbolis treege vigla aktiveco kun tre bunta palitro de ideoj kaj platformoj. Tio tuŝis ankaŭ la esperantistaron. Ĉiuj esperas, ke sub la novaj kondiĉoj estas pli facila la realigo de novaj kaj malnovaj taskoj, starantaj antaŭ la esperantista movado ne nur en nia lando.

En Sofio formiĝis esperantista grupo kun propra

pritakso de la nuna stato de BEA-agado kaj kun proponoj pri ties rekonstruado. En formo de letero tiu dokumento estis dissendita al la esperantistaj societoj porinforme. Ĝi estas titolita: „Rekonstruo hodiaŭ, sed ne morgaŭ!“. Tiamaniere la grupo esperas plivigligi la diskutadon de siaj proponoj en societaj kunvenoj, dum estrarkunsidoj kaj dum la kongresdiskutado fine de junio en Ŝumen.

Kompreneble, ĉiu esperantisto aŭ societo havas la rajton partopreni aktive la necesan laboron por plibonigo de la tuta agado de nia asocio.

Ekzistas problemoj realiĝeblaj pli facile kaj en pli mallongaj tempodaŭroj. Ekz. dissolvi aŭ krei novajn strukturojn, malgrandigi la nombron de pagita personaro kaj plilarĝigi la principon de memvola senpaga laboro, personaj ŝanĝoj en la konsisto de la gvidaj organoj en la supro aŭ en la societaj estraroj, plirapidigo de la konstrulaboroj por la nova Esperantista Domo en Sofio aŭ por konstruado de societaj kunvenejoj kaj kancelarioj. Se necese, oni povas per voĉdonado en plenkunsido de CE akcepti la demi-

sion de la prezidanto, kiu pretas por tio.

Tamen la plimulto el la postuloj de la platformo „Rekonstruo hodiaŭ, sed ne morgaŭ!“ havas tute alian karakteron. Inter ili troviĝas eĉ „eternaj“ problemoj de la internacia, ne nur de nia esperantista movado. Ĉu estas ebla tuja solvo de similaj taskoj? Ĉu ĝenerale eblas fari tion („Hodiaŭ, sed ne morgaŭ!“), sciante, ke kompletaj esperantistaj generacioj laboris dum jardekoj, sed ne sukcesis atingi kontentigan solvon?

La preparo kaj eldono de diversaj kaj variaj laŭ enhavo kaj stilo lernolibroj de Esperanto, diversspecaj vortaroj, preparo de la necesaj kvante kaj kvalite instruataj pedagogoj, kreo de Esperanta scienca instituto kun spertaj esperantologoj kaj specialistoj pri interlingvistiko kun propra financa bazo, kabinetoj ktp. — tiuj kaj similaj ege seriozaj taskoj povas realiĝi nur per mobilizo de multaj fortoj de BEA kaj dum longa periodo.

Kiel videble, facilaj solvoj de komplikaj taskoj simple mankas.


Nikola ALEKSIEV

Mio wo

Ni publikigas la leteron al la CE de BEA de dr. sc. Kiril Velkov kaj Ljubomir Trifončovski kaj alvokon de la movado „Esperantistoj por vera rekonstruo“ sur p. 15, 16 kaj 17.



La Verda Partio



Fonda kunveno de Verda Partio. Sur la unua plano dekstre estas Al. Karakaĉanov, prezidanto de la Partio.

Multaj niaj legantoj interesiĝas pri la nova politika vivo en Bulgario post la 10-a de novembro, 1989, kiam estis renversita la unupersona reĝimo de la eksa ĉefo de Bulgara Komunista Partio kaj de bulgara ŝtato Todor Jivkov.

Ekde tiam estis fonditaj pli ol 20 novaj politikaj partioj kaj preskaŭ 80 amasorganizaĵoj.

Ni sinsekve konatigos al vi, karaj legantoj, iujn el tiuj partioj kaj organizaĵoj.

Fine de decembro p. j. estis fondita **Verda Partio**, kies gvidanto estas la juna filozofo Aleksandro Karakaĉanov.

La Politika Deklaracio de la Partio proklamas, ke ĝiaj membroj metas en la centron de atento „la homon kaj la kvaliton de la vivo”. Ili speciale rimarkigas, ke la ĉefa slogano de la Partio estas: „Ni insistas pri radikala ŝanĝiĝo, kaj ne pri rekonstruo!”

„Ni donas al ni precizan kalkulon pri tio, ke ni povas krei pli bonan eblecon pri la ĝenerala funkciado de la sistemo „naturo-ekonomio-homo”, por ke la homo ĉerpu el la naturo ne nur materialajn valoraĵojn, sed ankaŭ pli profundan vivnecesan sencon, kaj la ekono-

mio garantiu la bonstaton de ĉiu persono, sen malŝpara uzado de la naturo kun daŭraj kaj fatalaj postsekvoj.”

„Ni insistas pri vortumo de klaraj kaj atingeblaj celoj por limigo de la malpurigo de aero, de akvoj kaj tero. Bulgario bezonas modernan kaj efikan ekologian leĝfaradon, reguligajn mekanismojn, stimulojn kaj modelojn, kiuj antaŭigas la sanitarajn problemojn, kaŭzitajn de la industria, agrara, transporta kaj aliaj polucioj. Surbaze de adekvata ekologia inform sistemo, la normigaj dokumentoj devus reguligi la kontrolon pri malpurigo de la naturo, la efikecon de la energiaj kaj krudmaterialaj elspezoj de la produktaĵoj kaj la procezoj, samkiel la produktadon, la vendon, la uzadon, la transporton kaj la neniigon de malutilaj al la sano kemiaj, biologiaj kaj radioaktivaj materialoj. Ni opinias, ke celkonformas iompostioma akcepto de la ekologiaj modeloj de Eŭropa Ekonomia Komunumo.”

Inter la membroj de Verda Partio estas ankaŭ multaj esperantistoj.

En n-ro 12/1989 de „Bulgara Esperantisto“ ni publikigis enketon konsistantan el demandoj rilate vian multflankan opinion pri la revuo. La enketo estas unu el la vojoj, kiujn ni serĉas por dialogi kun vi. Tiumaniere ni deziras konstante plibonigi nian periodaĵon konsiderante viajn opiniojn, dezirojn, sugestojn, pritaksojn.

Gis nun venis pli ol 20 detalaj respondoj el Bulgario kaj eksterlando. Pro la malfruigo de numero 12/1989 en la presejo, eble ne ĉiuj sukcesis tuj reagi ĝis la anoncita limdato — la 20-a de februaro k. j. Pro tio ni informas vin, ke ni atendas viajn respondojn dum la tuta jaro — ĝis la publikigo de la nova enketo en numero 12/1990, ĉar ni intencas, ke ĝi restu tradicia dialoga formo kun vi. Pro tio ni republikigas la demandojn, presitajn pasintjare:

- 1. Kiu publikaĵo en numero.../1989 estas plej sukcesa?*
 - 2. Kiu publikaĵo en numero.../1989 estas plej malsukcesa?*
 - 3. Kion vi opinias pri la lingvaĵo de „Bulgara Esperantisto“?*
 - 4. Kion vi atendas legi en revuo „Bulgara Esperantisto“?*
- Viaj nomo, adreso, profesio kaj aĝo?*

Unua respondis al la enketo Evdokia Nikolova el Varna. Pro tio ŝi gajnas la libron „Tango“ de Georgi Karaslavov.

Inter la respondintoj de la enketo ni lotumis E-libron „Beletraj eseoj“ de bulgara E-aŭtoro Georgi Miĥalkov, kunlaboranto de la revuo, sur kiu estas lia aŭtografo. La gajninto nomiĝas Marijka Taneva — 55-jara laboristino el Karnobat. Al ambaŭ legantinoj niajn gratulojn!

Kiujn konkludojn ni povas fari rezulte de la enketaj respondoj:

● Bedaŭrinde respondis pleje esperantistoj, kies aĝo superas 55 jarojn. Ĉu tio signifas, ke nia legantaro eĉ esperantistaro maljuniĝas kaj en ĝin ne enfluas freŝa sango!

● La profundeco de la respondoj dependas de la esperantista sperto kaj la lingvonivelo de la respondintoj. Tiurilate ni konstatas, ke la nombro de la spertaj kaj nesufiĉe spertaj respondintoj egalas.

● La interesoj de la legantoj tre varias kaj por ilustration ni donos ĝeneraligitajn respondojn de ĉiu enketa demando:

1. Estas kvar grupoj de respondoj, nome:

— La propono de Nikola Nikolov kaj Violin Oljanov pri Lingva Instituto en nia lando (n-ro 12/1989), „Instrui Esperanton estas respondeco“ de Kremona Bâceva (n-ro 8—9/1989);

— La beletraj verkoj en n-roj 3 kaj 6/1989 kaj la poeziaĵoj en n-ro 6/1989;

— La publikaĵo „Vango“ en n-roj: 10, 11, 12/1989;

— La fotoj en n-ro 8—9/1989 „Artikoj“ kaj „Medito“.

2. „Modo“ en n-roj 1, 6/1989, „Testo“ — n-ro 8—9/1989.

3. La plimulto de la respondintoj alte pritaksas la lingvaĵon de „BE“. Laŭ ili ĝi estas klara, Zamenhova, sufiĉe riĉa. Iuj opinias, ke estas publikaĵoj, en kiuj la lingvaĵo estas iom influata de la bulgara lingvo.

4. Estas rekomendoj, iuj eĉ kontraŭdiraj, ekz.:

— M. Taneva: „Pli malofte oni skribu pri veteranaj esperantistoj, pri pasintaj aranĝoj.“

— Hristo Tonev el Ŝumen: „Publikigu pli da inte-

resaj historiaj materialoj rilate la E-movadon, enlandajn E-novaĵojn, artikolojn pri gravaj movadaj problemoj.“

— Maria Dejanova el Samokov: „Aperigu regulan prilingvan rubrikon, periode — portretojn de E-verkistoj eksterlandaj kun fragmentoj el iliaj verkoj (konsiderante, ke la E-libroj el eksterlando estas por ni, bulgaroj, malfacile alireblaj); pli da informoj pri E-movado tutmonda (ekz. Diskutoj pri strategiaj problemoj, atingoj en faka aplikado de Esperanto).“

— Pravas la plendoj de Evd. Nikolova pri publikado de pli freŝaj kaj aktualaj materialoj. Ni devas konfesi, ke la presperiodo de „BE“ estas 3—4-monata kaj tio sufokas ankaŭ nin. Pro tio ni strebas aranĝi plej urĝe modernan presejon ĉe la redakcio, atingonte tiumaniere 10-tagan presperiodon de la revuo. Tiam ni povos oferti aktualan periodaĵon.

Al ĉiuj, kiuj estis afablaj respondi al nia enketo, kaj al ĉiuj respondintoj — niajn sincerajn dankojn kaj salutojn!

LA REDAKCIO

Antaŭuloj de Esperanto en Bulgario

(Daŭrigo el n-ro 4/1990)

Danko MURGIN

Tria persono, kiu kontribuis praktike por starigo kaj enkonduko de interslava helpa lingvo estis Vladimiro Viktoroviĉ Ŝarkov, el Peterburg (nun Leningrado). Laŭ komiso de Panславisma Komitato li migris al Bulgario kaj ekloĝis en Sofio, kie li ekfunkciigis sian entreprenon. En la aŭtuno de 1885 li eldonis propagandan varbilon⁶ (amase disvastigitan tra la tuta lando), kiu enhavis la programon de la eldonota de li scienc-filozofia, belliteratura kaj politika „Bulgara-Rusa Gazeto“ („Bolgaro-ruskij ĵurnal“), kies unua numero aperis en januaro 1886⁷. Tiu kajero estas impona, respektiga volumeto kun tre varia enhavo en pli ol 100 paĝoj⁸.

Ŝarkov (aŭtoro, redaktisto kaj eldonisto de la gazeto) deklaras: „Ni deziras servi al homara klerigo ĝenerale kaj al la slavaro speciale“⁹. Plue li promesas pledi por projektoj de monda, tuteŭropa kaj interslava lingvoj¹⁰ (p. 28). Tamen en la unua gazet-kajero li pritraktis nur la problemon pri kreado kaj ekfunkciigo de Komuna Interslava Lingvo.

Ŝarkov supozis, ke per kreskanta simpligo de bulgara kaj rusa lingvoj oni sukcesos iom post iom krei iun mezan lingvon inter la bulgara kaj la rusa. Tiu ĉi meza bulgara-rusa lingvo jam havis prototipon. Temas pri la tiam parolata lingvo en la bulgaraj kazernoj, kie rusaj oficiroj instruis al la bulgaraj soldatoj la arton militi. Komence la rusaj oficiroj parolis al la soldatoj ruse kaj la soldatoj respondis bulgare, sed pro la granda simileco inter la du lingvoj ili povis interkompreniĝi, interkomunikiĝi.

Ofte, tamen, okazis miskomprenoj pro ekzisto de vortoj kaj esprimoj, kiuj en ambaŭ lingvoj havis similan aŭ koincidan elparolon, sed semantike estis tute malsamaj. Tial, pro bezono de praktiko, oni iom post iom kreis kazernan (fakan) rusan-bulgaran aŭ bulgara-rusan lingvon. Ŝarkov estis konvinkita, ke tiu meza bulgara-rusa lingvo povus esti komprenata ankaŭ de la cetera slavaro. Kaj feliĉe li ne nur teoriumis kaj revis, sed ankaŭ efektive alpaŝis al solvo de la problemoj jam en la paĝoj de unua kajero de sia monata gazeto.

La artikolojn, verkitajn de rusaj aŭtoroj, li aperigis en simpligita rusa lingvo kaj tiujn de bulgaraj aŭtoroj — en simpligita bulgara lingvo. Per tiu paralela simpligo de la du slavaj lingvoj li celis iompostioman interproksimiĝon kaj ties kunfandiĝon en unu komunan interslavan lingvon. La unua stadio de la simpligo ampleksis radikalan reformon en la ortografio kaj kompletan forigon de la difina artikolo el bulgara lingvo. Al la teksto de ĉiu paĝo grapple abundis piednotoj, klarigantaj la nekonatajn vortojn.

La ricevota meza bulgara-rusa lingvo estos nur unua simpla prototipo de interslava lingvo, kies detala ellaboro sekvos post plua interfero inter la meza bulgara-rusa lingvo kaj la serba. La renovigita bulgara-rusa-serba lingvo estos absorbinta ĉion bo-

nan kaj necesan el la serba lingvo. Tiu bulgara-rusa-serba linvo estos jam preta interslava lingvo por la ortodoksaj slavoj¹¹. La interfero de la juna interslava lingvo povas daŭrigi kun la lingvoj pola, ĉeĥa, slovakaj, slovena k. a., ĝis kiam la interslava lingvo maturiĝos t. e. ĝis kiam ĝi absorbos ĉion bonan kaj necesan por la perfekta Komuna Interslava Lingvo.¹¹

La problemoj pri kreado de tuteŭropa kaj monda lingvoj ne estas traktitaj en la unua n-ro de „Bulgara-Rusa Gazeto“. Aliaj numeroj ne aperis. Laŭ mi Ŝarkov konsideris triŝtupa la solvado de monda lingvoproblemo: La unua ŝtupo estas kreo de „zonaj“ lingvoj (Interslava, Interlatinida k. a.). La dua ŝtupo estos kreo de „kontinentaj“ lingvoj (Eŭropa, Azia, Afrika lingvoj) kaj la lasta — kreo de Interkontinenta aŭ Monda Lingvo.

Kvankam la tuta entrepreno de Vladimiro Viktoroviĉ Ŝarkov fiaskis senlore jam en sia suĉ-infana lulilo, ĝi tamen pliriĉigis la sperton de la socio kaj tio faciligis — en certa grado — la sekvantajn funkciulojn de internacilingva movado en Bulgario.

Kaj tamen, kiam ni deziras prezenti la bulgaran kontribuon al starigo kaj funkciigo de Komuna Interslava Lingvo ni devas nepre konsideri la klopodojn de Ivan Andreev Bogorov (1820—1892). Lia tiurilata kontribuo estas atentinda, sed ĝis nun preterlasita kaj ignorata, tial ĝi restis nekonata al la bulgara esperantistaro, al la ordinara bulgara leganto kaj eĉ al iuj fakuloj pri lingvistiko. Eble malgrandan escepton faris Ĥristo Totev Rjaĥovski (1881—1933) per sia artikolo „Panславisma Lingvo“¹². Bedaŭrinde li erare parolas pri kontribuo de Petro Atanasov Beron (1795—1871), anstataŭ pri — Ivan Andreev Bogorov (1820—1892). Lastatempe universitata profesoro Ĥristo Pârvev klarigis la kaŭzojn pri orientiĝo de Bogorov al Komuna Interslava Lingvo: „La apatio de tiutempa sufiĉe vasta popolamaso kaj la sarkasmo de inteligentulaj rondoj (kiel ankaŭ aliaj faktoroj) elrevigis Bogorov-on en la lastaj jaroj de lia vivo kaj lin direktas al tre abstrakta ideo pri Komuna Literatura Interslava Lingvo“¹³.

Bogorov kontraŭstaris energie al la klopodoj pri revivigo de eklezi-slava (malnov-bulgara) lingvo kiel literatura kaj parolata lingvo de la bulgara popolo kaj manifestiĝis kiel arda adepto al tiutempe parolata de la popolo, nov-bulgara (moderna) lingvo¹⁴. Li estas aŭtoro de la unua gramatiko pri nov-bulgara lingvo (1844)¹⁵, kiun Siĉan Nikolov malrekomendis al la bulgara legantaro¹⁶. Certan parton de sia vivo Bogorov dediĉis al purigo de bulgara lingvo el fremdaj vortoj, proponante ties anstataŭigon aŭ per vortoj el la funkciantaj dialektoj aŭ per vortoj forĝitaj, t. e. derivitaj de bulgaraj vortradikoj kaj afiksoj. Tiurilate li montriĝis ekstremisto en certa tempo. Kvankam multaj vortoj de li derivataj fiaskis, oni tamen konas nun dekojn da vortoj en la moderna bulgara lingvo, kreitajn de Ivan Bogorov.

Pri la signifo de Bogorov-kontribuo al la pureco kaj disvolvo de novbulgara lingvo oni povas juĝi el la el-

paŝoj de eminenta bulgara historiisto Marin Drinov (1838—1906), kiu diris (1879): „Ni devas esti danke-maj, ke ni havas unu tian Bogorov!” kaj popola poeto Ivan Vazov (1850—1921), kiu konfirmis: „Jes, tiam Bogorov estis necesa, nun cent homoj kiel Bogorov estas necesaj — ili ridigos nin, sed ili severe avertos kaj korektos nin, ĉar nun ĉiuj — ankaŭ mi mem — eraras kontraŭ pureco de la lingvo”¹⁷.

La rilato de Bogorov al planlingvo variis, sed disvolviĝis pozitive. En 1846 li esprimis negativan opinion al ĝi, en recenzo pri la lernolibro „Bolgarska aritmetika”¹⁸. Ivan Bogorov tamen estas la unua, kiu komprenis jam en 1858, ke por siaj politikaj, ekonomiaj, transportaj, komercaj, religiaj kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando la bulgaroj bezonas kroman lingvon. Por la internaj lingvobezonoj de bulgara popolo li arde pledas por la parolata gepatra lingvo, sed por kontaktoj kun la slavaj popoloj li aspiris pri Komuna Interslava Lingvo.

Bogorov estas des pli decidema kontraŭ revivigo kaj akomodo de Komuna Interslava Lingvo en Bulgario (1874): „Kion ni serĉos en la eklezi-slava (malnov-bulgara) lingvo? Ĉu tio ne signifas, ke ni retroiras? Bulgara popolo vivas kaj parolas sian vivantan (modernan) lingvon, per kiu ĝi interkomunikiĝas. Kial ni ne iras inter la popolo mem ellerni ties (nunan — klariĝo mia: C. M.) lingvon, sed ni serĉas tiun lingvon en la eklezi-libroj, kiujn ni delonge lasis nur por diservoj en la preĝejoj?”¹⁹

Oni povas diri, ke ekde XVIII jarcento la bulgaraj kleruloj disputas pri la literatura kaj parolata lingvo de bulgara popolo. Iuj pledis por revivigo (post „plibonigo”, simpligo) de eklezi-slava (malnov-bulgara) lingvo kaj aliaj defendis la modernan (vivantan, nun parolatan de la popolo) lingvon. Ambaŭ partioj ne konis (nek proponis) kompromisan solvon.

En 1867 Ivan Bogorov partoprenis la panslavisman kongreson. Li estis elrevigita pro klopodoj pri miksiĝo de ŝovinismo al pura lingvoproblemo inter la slavaj popoloj. Bogorov deklaris antipation kontraŭ ŝovinismo kaj kontraŭ Komuna Interslava Lingvo²⁰.

Poste sekvis du gravaj sociaj eventoj, kiuj forte influis al lia lingvokonstrua laborado. En 1876 Bogorov kune kun multaj aliaj bulgaroj batalis volontule en la vicoj de serba armeo kontraŭ la otomana armeo. Li estis inspirita por plua kunlaboro en pacaj kaj interhel-paj kondiĉoj. En la liberiga por Bulgario Rusa-Turka Milito (1877—1878) li partoprenis kiel tradukisto en stabo de la rusa armeo. Venis tempo por intensa kunlaboro je ŝtata nivelo inter la slavaj nacioj. Pro ŝovinismo kaj intrigoj de aŭstra imperiismo eksplodis Serba-Bulgara Milito (1885). Bogorov sentis grandan amaron pro tiu milito inter du slavaj landoj. Inspirita de paca kunlaboro Bogorov havis komence de 1887 detalan platformon por agado. En januaro-februaro 1887 li pretigis kaj komencis eldoni semajnan gazeton „Slovenija”, kiu aperis nur en ses numeroj²¹.

Antaŭ ol komenci sian agadon por Komuna Interslava Lingvo Bogorov estis profunde konvinkita, ke modelo de ties prototipo jam ekzistas: „Estas jam parolata la Interslava Lingvo. Nun en Sofio, en Kafejo de Panaĥov venas multaj gastoj: bulgaroj, rusoj, serboj, ĉeĥoj, poloj, slovakoj. En la interparoloj neniu el ili uzas sian aŭtentan gepatran lingvon, sed oni parolas iun Interslavan Lingvon en kies fundamento dominas

la bulgara lingvo. Tiuj diversslavaj personoj estas afergvidaj komercistoj kaj ili interkompreniĝas per la intermiksita bulgara lingvo, tio signifas, ke ekzistas jam Interslava Lingvo”²².

En jaro 1874 Ivan Bogorov baptis la lingvan komunumon de slavaro per la nomo „Slavjaniija”²³. Tiam li estis kontraŭ starigo de slavara lingvo-komunumo „Slavjaniija” kaj kontraŭ la Komuna Interslava Lingvo. Tamen en 1887 Ivan Bogorov eklaboris kun fervoro por la interslava lingvo-komunumo jam nomata ĉi-foje „Slovenija”²⁴. Tiu nomo estis ankaŭ titolo de lia aktuala gazeto (1887). En tiu gazeto li esprimas opinion, ke la unuigo de slavaj popoloj devas komenciĝi per kunfandiĝo de lingvoj bulgara kaj serba. La bulgar-serba aŭ serb-bulgara lingva-unueco fariĝos la kerno de Komuna Interslava Lingvo. Iom post iom tiu miksi-ta bulgar-serba lingvo devas absorbi sisteme ankaŭ la bonajn kvalitojn kaj ĉion necesan el la ceteraj slavaj lingvoj.

Utiligante la rezulton el la kontribuoj de elstaraj batalantoj (inkluzive tiun de V. Ŝarkov) por starigo de interslava lingvo-komunumo Ivan Bogorov aperigis sur la paĝoj de gazeto „Slovenija” tekstojn kaj glosarojn, kiuj devas servi „al ĉiu kiel modelo pri skriba Komuna Interslava Lingvo”²⁵.

Krome, en la sama tempo (komence de 1887) Ivan Bogorov eldonis (en aparta libro) sian Interslavan Vortaron kun traduko en franca lingvo: „Komuna Interslava Lingvo, Komparita kun la Franca. Kompilis I. A. Bogorov laŭ F. Mikloŝiĉ, F. Rjig, N. Makarov, K. Rejff, N. Petroviĉ, I. Filipoviĉ, K. Faste, I. Smidt kaj V. Ŝarkov. Parto Unua. Sofio. Presejo de B. Presejo de B. Proŝekov. 1887”²⁶. Ĝi enhavas 3 915 fundamentajn vortojn.

Tiamaniere Bogorov plenumis grandparte sian internacilingvan platformon, kiun li aperigis en gazeto „Slovenija”²⁷. Ivan Bogorov ricevis nek moralan (per aproboj, kuraĝigoj), nek materialan (per abonoj, intensa varbado) subtenon, tial li ĉesigis eldonadi la gazeton „Slovenija” post n-ro 6. Bogorov sin limigis en kompilado de inversa vortaro, t. e. de Franca-Interslava. Bedaŭrinde tiu vortaro ne aperis. Ĉu la manuskripto estas konservita en iu biblioteko, ni ne estas informitaj. En la fino de sia vivo Bogorov aperigis sian lastan verkon „Penso pri Eklezi-Civitana (Lingvo-) Ortografio” (1892), kiu atestas pri liaj pluaj okupiĝoj kun la bulgara kaj Interslava Lingvoj.

La agado de Siĉan Nikolov, Averkto Popstojanov, Vladimir Viktoroviĉ Ŝarkov kaj Ivan Andrejev Bogorov por starigo de Komuna Interslava Lingvo estas la bulgara kontribuo al solvo de lingva problemoj inter la slavaj nacioj. Tiu laborado, diligenta kaj fervora, el lingvistika vidpunkto ne donis praktikajn rezultojn, tamen ĝi ne restis tute vana por la bulgara popolo. La bulgara socio akiris kelkan sperton, kiu estis utila en sekvaj similaj agadoj.

Ni notu, ke la adeptoj de Komuna Interslava Lingvo malkovris, registris kaj konigis al la mondo pri ekzisto de „nature” naskita kaj praktike funkcia Interslava Lingvo — en la bulgaraj kazernoj, inter la lernantaj bulgaraj soldatoj kaj la instruantaj rusaj oficiroj, kaj — en la Kafejo de Panaĥov (en Sofio), kie ĉiutage renkontiĝas komercistoj kaj aliaj gastoj el diversaj slavaj landoj. La bulgaraj adeptoj de Interslava Lingvo deziris normigi, reguligi kaj vastigi la arealon por funkciado de tiu lingvo-miksaĵo.

Samtempe oni konvinkigis, ke la proponata solvo estas limigita laŭ amplekso, ĝi estas destinita nur por slavo, sed la vivo mem starigas pli kaj pli insiste — la vastan problemon — interkomunikiĝi kun la tuta mondo, inkluzive kaj precipe kun la slavaj popoloj, sed ne malpli ankaŭ kun la neslavaj najbarpopoloj (grekoj, rumanoj, turkoj, albanoj) kaj kun la industrie progresintaj landoj de Okcidenta Eŭropo, kies politika, ekonomia kaj kultura influoj invadas kaj kreskas sur la Balkana Duoninsulo. Oni konkludis: necesas pli ampleksa solvo, solvo en internacia skalo. Baldaŭ alvenis en Bulgarien tiaj proponoj de lingvoprojektoj...

Notoj:

6. (Balan), A. Teodorov: (Recenzo pri varbroteksto por) *Bulgara-Rusa Gazeto*, oktobro 1885, p. 323—325, *Periodiĉesko spisanie, bulgarlingva*.
7. Šarkov, Vladimiro Viktoroviĉ: *Bolgaro-ruskij ĵurnal* (Bulgara-Rusa Gazeto), l. 1, p. 112, januaro 1886, *Sofio*.
8. a) Ivanov, Jordan: *Balgarskijat periodiĉeski peĉat ot vāzroĵdenieto mu do dnes (1844—1890)*, vol. 1, *Sofio*, 1893, p. 207.
- b) Balan, A. Teodorov: *Bulgara Bibliografio por la Centjaro 1806—1905*, *Sofio*, 1909, p. 127.
9. Noto 7, p. 23, p. 28.
10. Same, p. 28.
11. Noto 6, p. 325.
12. Rjaĥovski, Hristo Totev: *Panslavisma Lingvo*, p. 61, *Unua Paŝo*, l. 4, aprilo 1906, *Sofio*.
13. Pārvev, Hristo: Ivan Bogorov — *Elstara Renesanculo kaj Aŭtoro de „Unua Bulgara Gramatiko“* (Antaŭparolo), p. V—IX, en „Pārviĉka bālgarska gramatika, de (1844), de Ivano Bogorov, fototipa represo, *Sofio*, 1986.
14. Bogorov, Ivan: *I se započna s „Bālgarski orel“* (Kaj Oni Komencis per gazeto „Bulgara Aglo“), (Elektitaj Verkaj), *Sofio*, 1983, p. 314—319.
15. a) Bogorov, Ivan: *Pārviĉka bālgarska gramatika* (Unua Bulgara Gramatiko, 1844), fototipa represo, *Sofio*, 1986.
- b) Noto 14, p. 43—47, p. 82—95.
16. Noto 2, p. 6.
17. Vazov Ivan: *Edin izlet iz senkite na našija ĵivot* (Ekskurso tra la Ombroj de Nia Vivo), p. 819—823, (Verkita la 23-an de oktobro 1919), *Sābrani sāĉinenija* (Plena Verkaro), vol. 18, *Sofio*, 1957.
18. Noto 2, 5—6.
19. Noto 14, p. 316.
20. a) Noto 14, p. 394—305.
- b) Bogorov, Ivan: *Edin i obšt bālgarski ezik* (Unu kaj Komuna Bulgara Lingvo), 1874, p. 103—107, *Elektita Verkaro*, *Sofio*, 1940, p. 103.
21. Bogorov, Ivan: *Slovenija, semajna gazeto, bulgarlingva*, l. 1—6, 1887, *Sredeĉ* (Sofio).
22. Same, l. 1, 1887.
23. Noto 20 b), 1940, p. 103.
24. Noto 22.
25. Same.
26. Bogorov, Ivan Andreev: *Vseobštij slavjanskij jazik sravnen s francuzkij* (Komuna Interslava Lingvo, tradukita en franca lingvo), *Kompilis Ivan Bogorov laŭ F. Miklošić, F. Rjig, N. Makarov, K. Rejff, N. Petroviĉ, I. Filipoviĉ, K. Faste, I. Šnidt kaj V. Šarkov. Parto Unua*, *Sofio*, Presejo de B. Prošekov, 1887.
27. Noto 21, l. 1, 1887.

RENASKIĜO DE LA RUMANA E-MOVADO

La unua libera urbo de Rumanio, heroo kaj martira Timișoara, jam delonge centro de E-movado en nia lando, estis ankaŭ la urbo, en kiu renaskiĝis, la 7-an de januaro 1990, tutlanda asocio de Esperanto, laŭ iniciato de Kolektivo Esperanto kaj Interlingvistiko (KEI) ĉe la Universitato. Por faciligi ĉiujn kontaktojn, ni translokiĝis ĝin poste al Bukareŝto. KEI restos kaj agados plue en Timișoara.

La 14-an kaj la 15-an de januaro k. j., reprezentanto de KEI salutis per radioelŝendo la aŭskultantaron rumane, hungare, germane, serbokroate kaj esperantlingve, legis facilaŭ triminutan E-tekston kaj dekminutan rumanlingvan alvokon por E-asocio kaj por la nobla ideo de Internacia Lingvo. Redaktoro de Radio Timișoara anoncis la eblecon elsendi estonte ankaŭ esperantlingve. La ekologia gazeto de Timișoara havos ekde sia unua numero kelkajn paĝon en kaj pri Esperanto. La Universitato kaj la ŝtata eldonejo de Timișoara reaperigos grandkvante kaj en multe pli bonaj teknikaj kondiĉoj ol antaŭe **Curs elementar de Esperanto** (I. F. Bociort, Mioara Dobre). En du-tri monatoj estos prespreta la Granda E-Rumana Vortaro kompilita de KEI.

Oni tre bone konscias, ke E-organizaĵoj ne estas riĉaj entreprenoj. Tial ni faras nur jenajn sugestojn rilate al ebla helpo.

Bonvolu laŭeble inviti niajn gejunulojn al viaj sciencaj, kulturaj, primovadaj, turismaj aŭ lingvoperfektigaj aranĝoj. Tio grave efikos en nia lando, kiu jardekojn forestis en Esperantujo. Bonvolu sendi la invitilojn al KEI en Timișoara.

Ni bezonus E-librojn por teorie fundamenti la movadon, por E-esploroj, por E-kursoj, por perfektigaj legaĵoj kaj konversacioj ktp. Eĉ malnovaj revuoj estus bonvenaj, ĉar ni dissendas ilin al la tuta lando, al interesitoj petantaj E-lernolibrojn kaj revuojn por lerni la lingvon kaj informiĝi pri E-movado.

Bonvolu sendi viajn E-donacojn al Kolektivul de esperanto, Universitatea din Timișoara, R—1900 Bd. V. Pārvan 4, Rumanio.

Prof. d-ro Ignat BOCIORT



El nia leterkesto

Estimataj samideanoj,

Mi estas rumana esperantisto kaj abonanto de „BE” de 1987. Mi alte taksas la laboron de la bulgaraj esperantlingvaj gazetoj, kiuj per bonaj lingvaĵo kaj presarango penas prezenti la bulgaran E-movadon al eksterlando.

Vi jam eksciis, ke la decembraj eventoj en nia lando okazis precipe en la plej grandaj centroj de la rumana movado, t. e. Temešvaro kaj Bukareŝto. Nun, post kiam la ŝtormo — ni esperas — pasis, rumanaj samideanoj komencas agadi. Laŭ informoj, pri kiuj mi disponas, bukareŝtaj esperantistoj deziras restarigi Rumanan E-Societon sub nova nomo: eble Rumana Esperanto-Asocio kaj mi kredas, ke ili bezonas ankaŭ vian helpon. Tial estus bone, ke iuj bulgaraj esperantistoj kontaktu kun prof. d-ro Aurel Boia, C. P. 17—24, R—77700 București por helpi lin en tia laboro. Ni bezonas ankaŭ librojn eldonitajn precipe en la lastaj tri jaroj. Mi esperas, ke vi povos trovi en viaj kontaktoj kun s-ro A. Boia la plej bonan solvon de ĉi tiu afero.

**Salute,
Doru NEAGU**

Karaj amikoj!

Mi ricevis kun granda ĝojo vian leteron. Mi dankas al vi pro via afableco sendi al ni senpage la revuon „Bulgara Esperantisto” dum 1990. La revuoj multe helpas min por lerni pli bone Esperanton.

Nun ĉar ni fariĝis liber-popolo mi deziras el tuta koro lerni bone Esperanton kaj pli facile ligi amikecojn al esperantistoj tutmonde, kiujn mi pli bone ekkonu kaj vizitu.

Mi kaj mia edzino multe deziris viziti vian landon, sed tio ne estis ebla. Ni esperas, ke en la estonto ni povos tamen viziti Bulgarijon.

Mi kune kun mia edzino Violeta kaj nia infano Sebastian kore deziras al vi kaj al viaj kolegoj bonfarton, feliĉon kaj sukceson en via laboro!

**La familio
David EUGEN**

P. S.: Jen la listo de rumanaj esperantistoj, kiuj serĉas amikojn-esperantistojn kaj kiuj ricevas senpage nian revuon dum 1990.

Emilia Veress
str. Scolii NR 104
4033 — Bodoc
Jud. Covasna

Ioan Haraga
Micro, 3, Bloc A3, Ap. 38
R—5100 Buzău
Jud. Buzău

Annamaria Kallos
Str. Morli 5/A, 32 80
Slng. de Pădure
Jud. Mures

Karaj rumanaj amikoj,

niajn salutojn rilate la renaskiĝon de via Esperanto-movado! Ni bondeziras al ĝi multajn sukcesojn!

Antaŭ nelonge en „BE” ni anoncis pri la monhelpo de BEA por la rumana popolo — 5 mil levoj.

Ankaŭ ni pretas daŭrigi la senpagan sendadon de „BE” kaj aliaj bulgaraj E-eldonaĵoj.

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Sofia E-Ĥoro en „Arkones”—89



Intensa laboro, interesa vojaĝo kaj bonega koncerto. Konkize tio estas la bilanco post la gastado de la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj en la internacia E-festivalo „ARKONES”, kiu okazis de la 20-a ĝis la 22-a de oktobro 1989 en urbo Poznan, Pollando. La koncerta turneo digne kronis la persistan laboron de geĥoranoj kaj artgvidantoj dum la sukcesa artsezono 1988/89, kiam la Ĥoro celebris sian 10-jaran jubileon.

La festivala programo konsistigis internajn ĝenrajn-muzikajn recitaĵojn, poeziajn spektaklojn, videofilmojn, seminarion, traktantan la problemojn de Esperanto-kulturo k. a. La Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj kun artgvidantoj Katja Vučkova — ĥorestrino kaj Liljana Panajotova — akompanistino prezentis sin per unuhora koncerto-recitalo en la lasta tria tago de la festivalo. La koncerta programo de la Ĥoro estis konstruita laŭ unueca scenaro kaj konsistis el la plej interesaj, ŝatataj kaj novaj kantoj de ĝia repertuaro: „Ho, mia kor’”, „Bordo de amikeco”, „Jubilea kanto pri Esperanto”, „Tri junulinoj” k. a. En la programo partoprenis ankaŭ Anna Ivkova, profesia aktorino.

La programgvidanto Morjana Văleva sperte realigis senĝenan kontakton kun la publiko — precipe junulara. La opinio de la muzikistoj estis, ke la Ĥoro prezentis sin per bonega kantkulturo kaj perfekta ĥoreago. La dommastroj de la festivalo enmanigis al la Ĥoro dankleteron, en kiu oni dankas pro la perfekta kaj bonega prezentado de E-kantoj dum la arango.

Katja VUČKOVA

PRI IUJ GRAMATIKAJ FENOMENOJ

S-ino Maria Dejanova el Samokov en sia letero al la Redakcio demandas:

1. Ĉu estas norma la uzo de imperativo en suborda propozicio por esprimo de pridubata ago? Ekz.: „Kaj kvankam estis apenaŭ kredeble, ke ŝi **estu** prava, tamen...” (W. Auld, „Paŝoj al plena posedo”, p. 16).

2. Ĉu estas norma la uzo de kondicionalo por esprimo de nereakta informo (ĉe rerakonto de fremdaj paroloj?). Ekz.: „Mi legis kelkajn negativajn kritikojn pri tiu libro. Ĝi ne **estus** objektiva. Ĝi neklare **montrus** la eternan superecon de Esperanto. Ĝi ne **priskribus** ĝiajn kuracajn efikojn kontraŭ ĉia lingva malsano. Ja efektive ĝi ne dirus nur tion, kion nia propagandista koro ŝatus aŭskulti”. (Renato Corsetti, „Heroldo de Esperanto”, 1987, № 1, p. 3).

3. Post kiuj verboj de mensa ago estas uzebla infinitivo (anstataŭ suborda propozicio, laŭ modelo: „Mi bedaŭras ne **havi** la libron ĉemane”; „Mi ne memoras **esti** jam vidinta tiun homon” (komp. „Sub la jugo”, p. 191, kie legeblas simila frazo); „... MPK (kiun ni agnoskis **esti** neneŭtrala organizaĵo)”. (M. Fettes, „Esperanto”, 1988, p. 56).

4. Ĝis kia grado estas regula kaj produktiva la medialo de transitivaj verboj en kazoj, kiam temas pri agoj evidente havantaj sian plenumanton ekster la gramatika subjekto de la frazo, kvankam nesignitan? Ekz.: „La internacia komunikado ja ne estas celo en si mem... Eble pro tio ĝi ofte **menciigas** en listoj...” (H. Tonkin, „Esperanto”, 1988, p. 9); „jubilea libro, kiu **eldoniĝos** antaŭ la 73-a UK” (S. Milojeviĉ, „Esperanto”, 1988, p. 2); „Al E. Privat dediĉiĝos la venonta jaro...” („Esperanto” 1988, p. 205, M. Fettes); „...Subskribiĝis novaj kontraktoj...” („Esperanto” 1988, p. 104).

5. Fine mi petus helpi al mi klasifiki la sintaksan funkcion de la dua infinitivo en la frazo: „Kolekti krevitajn grenpistujojn

inter la maljunulinoj estas ridinde eĉ **paroli** — kontraŭdiris Ognjanov.” („Sub la jugo”, p. 274). Subjekto de la frazo estas **kolekti**, ĉu ne?

RESPONDOJ

Pri punkto unua. En la prezentita ekzemplo mi uzus ne imperativon, sed kondicionalon: „Kaj kvankam estis apenaŭ kredeble, ke ŝi **estus** prava, tamen...” Tie ĉi estas nek ordono, nek iu alia premiso, permesanta la uzon de imperativo.

Pri punkto 2. La uzo de kondicionalo ĉe rerakonto de fremdaj paroloj ŝajnas al mi malregula. Ĝi povas kaŭzi miskomprenon. En similaj okazoj mi rekomendas klarigajn vortojn. En viaj ekzemploj: „Mi legis kelkajn negativajn kritikojn pri tiu libro. Ĝi ne estas, laŭ oni (laŭ li, laŭ la aŭtoro) objektiva. Oni asertas, ke ĝi neklare montras la eternan superecon de Esperanto, ne priskribas ĝiajn kuracajn efikojn kontraŭ ĉia lingva malsano...”

Pri punkto 3. Laŭ mi ni rajtas post ĉiu verbo bezonanta verban komplementon uzi infinitivon, se estas kondiĉoj postulataj de la reguloj pri la uzo de infinitivo. Ekz.: „Mi ĝojas vidi vin”; La apostoloj timis esti rimarkitaj. Mi estas feliĉa havi la bildvortaron; „Mi kontraŭas partopreni tiun kunvenon” (sed: „Mi kontraŭas, ke vi partoprenu...”); „La registaro permesis al la minoritatoj adopti nomojn...”; „Oni observis lin multfoje ŝteli pomojn de la ĝardeno”.

Pri punkto 4. En la elementaj gramatiklibroj kaj en la kursoj ni instruas, ke la medialo (iĝ-formo) estas uzata, kiam la ago efektiviĝas en la subjekto mem sen lia volo, plej ofte pro naturaj kaŭzoj kaj fortoj (ŝi ruĝiĝis pro honto, la folioj flaviĝas en la aŭtuno, la akvo glaciĝas ktp.). Tamen en la ĉiutaga lingvouzo ofte la lingvo evoluas deviate de la starigitaj reguloj. La medialo montriĝis tre oportuna, almenaŭ pli oportuna ol la pasiva kaj refleksiva formoj kaj pli kaj pli forpuŝas kaj anstataŭas ilin. Tiel, oni nun uzas: „Nova prezidanto elektiĝis” (anst. „Nova prezidanto estis elektita”), „Lia nomo menciigas ofte” (anst. „estas menciata”), „La libro eldoniĝis jam plurfoje” (anst. „estis eldonata”) ktp. La praktiko, la vivo faris tiun ĉi formon norma kaj estas nenia senco kontraŭbatali ĝin el dogmaj pozicioj.

Pri punkto 5. En via frazo la infinitivo „paroli” ludas rolon de atributo al la vorto „ridinde”. Kune ili (ridinde paroli) prezentas predikativon en la trazo. Por trovi la subjekton ni devas demandi: „Kio estas ridinde paroli?” — „Kolekti”.

Violin OLJANOV


KOREANO EN BULGARIO

— S-ro So Gilsu, bulgaraj esperantistoj kun granda intereso ĉiam rilatas al la alveno en ties medion de eksterlandaj esperantistoj. Tiu intereso estas eĉ pli granda ol via ĉeesto en nia lando, ĉar vi venis el fora lando, Respubliko Sud-Koreo. Tion pravas tiu ĉi multe vizitita eksterordinara kunveno de la esperantistoj en Sofio. La Redakcio de revuo „Bulgara Esperantisto” petis min intervui vin, por ke ankaŭ la legantaro de la revuo eksciu ion pri vi, via agado kaj pri la aktivado de la koreaj esperantistoj. Ĉar vi kapjesas, ni komencu. Bonvolu rakonti pri vi kaj via esperantista agado?

— Mi nomiĝas So Gilsu. So estas familia, kaj Gilsu estas propra nomo. Mi estas profesoro pri ekonomiko en la universitato Kuk-ge. Mi esperantiĝis en la jaro 1966, estis prezidanto de Korea Esperantista Junulara Organizo, ĝenerala sekretario kaj vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio, sekretario de ILEI en Koreo. Ekde la lasta jaro mi laboras kiel estrarano de Universala Esperanto-Asocio pri agado en Azio kaj pri la scienca aplikado de Esperanto.

— Kiacele vi nun vojaĝas tra Eŭropo?

— Ĝis nun mi vojaĝis al diversaj landoj. En tiuj landoj



mi konatiĝis kun tieaj esperantistoj, kun la landa kaj loka E-movado. Tamen mi ne havis personan kontakton kun nia movado en Sovetunio kaj la orienteŭropaj landoj. Tio estas la celo de mia nuna vojaĝo. Kompreneble mi deziras ekkoni ankaŭ la kulturojn, kutimojn kaj la homojn mem de tiuj landoj.

Mia vojaĝo komenciĝis de Ĥabarovsk kaj daŭris 18 tagojn tra Irkutsk, Novosibirsk kaj Moskvo. La dua lando de mia vojaĝplano estas Bulgario, kaj poste sekvas Jugoslavio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj GDR. Poste mi vojaĝos al Roterdamo, por ke mi partoprenu la estraran kunsidon de UEA.

Dank' al multaj lokaj samideanoj ĝis nun mia vojaĝo estis tre sukcesa, interesa kaj fruktodona. Krom en Ĥabarovsk ĉie gastamaj esperantistoj perfekte aranĝis mian tagordon, kaj mi plene ĝuis ĝin.

— Kian grandan celon vi deziras realigi per Esperanto?

— Mi klopodas disvastigi Esperanton kaj samtempe praktiki ĝin. Mi estas tre okupata, sed mi utiligas mian liberan tempon kaj faras ĉion eblan por informadi pri la lingvo kaj akiri novajn adeptojn. Krome, resumante miajn tezojn en Esperanto, mi prelegas kaj publikigas artikolojn.

— S-ro So Gilsu, kio karakterizas la Esperanto-movadon en Sud-Koreo?

— Esperanto enkondukiĝis en la komenco de 1920 kaj tio montras, ke ni havas pli malpli 70-jaran historion. Ĉefa centro de nia movado, kompreneble, estas Seulo, kiu havas 10 milionojn da loĝantoj. Korea Esperanto-Asocio havas filiojn en la urboj: Pusan, Tegu, Tegon, Guanggu, Congu kaj Incon. Funkcias ĉirkaŭ 30 universitataj E-kluboj. En la movado plej aktivas la junularo. Tre efika kaj rezultodona estas la ĉi-jare organizata komuna seminario de koreaj kaj japanaj gejunuloj. Tiu seminario ĉiujare okazas alternative en ambaŭ landoj.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo decidis okazigi sian kongreson en Koreo en 1994, kaj Korea E-Asocio esploras la eblecojn okazigi en la sama jaro la Universalan Kongreson de Esperanto. Ni, koreaj gees-

perantistoj, estas konvinkitaj, ke ni povos bone organizi tiujn du plej grandajn forumojn en Esperantio kaj ili grave antaŭenigos nian movadon en Koreo. Mi esperas, ke tiam mi havos eblecon renkonti multajn el miaj bulgaraj amikoj en mia lando.

Venis nova sento en la tuta mondo, ĉio ŝanĝiĝas, kaj la rilatoj inter Sud-Koreo kaj Bulgario rimarkeble pliboniĝis. Mi esperas, ke Esperanto estos pioniro por efektiva homa kontakto.

— Dankon, s-ro So Gil-su, pri via preteco esti

intervjuita kaj pri la valoraj respondoj al la direktitaj demandoj. Ni deziras al vi ankoraŭ multe da impresoj kaj travivaĵoj dum tiu sufiĉe longa vojaĝo tra Esperantio.

Intervjuanto: Nikola NIKOLOV

PROVOKO KAJ ENTREPRENEMO

AŬ KIEL FUNKCIAS ESPERANTO-CENTRO EN PADERBORN (FRG)

Kvankam Paderborn estas iom for de la vojo de Hamburgo al Kolonjo, la vizito al la Esperanto-Centro en tiu urbo pravigis kelkhoran devojiĝon. Kun junulara grupeto el FR Germanio, Sovetunio kaj Bulgario mi eniris la centron. La antaŭe sciigita oficisto el la paderborna Centro Drago Smoliĉ gastame akceptis nin. Tentita de lia entuziasmo kaj parolemo mi starigis al Smoliĉ kelkajn demandojn.



— En movada medio la nomo de via E-Centro estas konata. Kia estas ĝia

rolo en Germanio, en aliaj landoj?

— La Centro estis fondita

en 1969. Nuna direktoro estas s-ro Herman Behrmann. La Esperanto-Centro en Paderborn estas la sola en FR-Germanio. † Ekzistas ankaŭ oficiala biblioteko de s-ro Führer, apud Frankfurto, sed ĝi funkcias alimaniere. La Centro disponas pri libroj kaj diversaj esperantaĵoj. Krome ni vendas kaj vendas E-librojn. Ni organizas ankaŭ grupojn por kongresoj. Nun ni preparas flugkaravanon por la ĉi-jara Universala Kongreso en Kubo — la prezo estas mil markoj. Ni faras ĉion, kio alportas al ni monon.

— Ĉu Germana E-Asoocio subtenas vin?

— Ne. Sed de tempo al tempo ili sendas al ni donacojn. Ankaŭ ni ricevas donacojn de donacemaj homoj, ĉefe el FR Germanio.

— Kiamaniere funkcias via E-Centro?

— Ĉi tie laboras nur du homoj — s-ro Behrmann kaj mi. Sed ni havas maŝinojn kaj bonan kartaron. En tiu kartaro estas ĉiuj niaj kunlaborantoj, klientoj kaj titoloj. Ni uzas ankaŭ komputilon. La leteroj devas ĉiam kuri — doni informon, gratuli klienton okaze de lia naskiĝtago. Oni devas klientojn teni, klientojn provoki, klientojn gratuli. Ni estas ĉi tie ne por

trinki kafon kaj babili tutan tagon. Mi bone konas kapitalismon kaj socialismon. Iuj pensas, ke ĉe kapitalismo hazarde falas mielo kaj lakto. Ĉi tie oni devas multe labori, eĉ barakti. Antaŭ nelonge mi vizitis Internacian Kulturan Servon en Zagrebo. Ili havas 12 salajratajn personojn — kassistinon, purigistinon, ofi-
cistinojn. Simila estas situa-
cio en Sovetunio kaj Bulgario.

— Vi vendas ankaŭ kasedojn. Ĉu vi surbendigas ilin?

— Pli grandan kvanton produktas fabriko, sed ni havas rajtojn kopii iujn kasedojn. Ĉi tie ni havas aparaton, kiu por tri minutoj surbendigas kaj elĵetas kelkajn pretajn kasedojn.

— Konfesu ion pri vi mem?

— Mi estas jam 40-jara esperantisto. Mi komencis lerni la lingvon en armeo kaj tial oni arestis min. Post tri monatoj mi fariĝis turista gvidanto en Zagrebo, mi lernis la lingvon kaj ekkonis multe da bonaj esperantistoj kiel Ivo Lapenna, Emilija Lapenna. Poste mi gvidis kurson. En 1963 mi vizitis la Universalan Kongreson en Sofio. Mi volis ekkoni la mondon per Esperanto. Mi iris labori en Germanio kaj mi oficis en instituto de profesoro Helmar Frank. Lastatempe mi organizis Esperantan Domon en la jugoslava vilaĝo Sanica. La domo estas tipa vilaĝa ŝtonkonstruaĵo 100-jara. En ĝi jam gastis rusoj kaj francoj.

— Kion vi opinias pri la-nuna E-movado?

— Se rusoj ne prenos ĝin en siajn manojn, ni ne sukcesos baldaŭ. Sed mi legas, ke en Sovetunio inter esperantistoj estas plena malkonkordo. Ĉiam kreskas organizaĵoj, kluboj, influoj, opinioj, kreskas ĉio, sed ne venas konkordo.

— Kia estas la situacio en Okcidento? Ĉu la Esperanto-movado progresas?

— La E-movado progresas, sed strange, ne tre rapide. Vi vidas, ke ni havas teknikaĵojn, ni havas ĉion, sed ne homojn, kiuj volas labori. Diable — jugoslavo, bulgaroj volas labori, sed ili ne havas maŝinojn. Mi pensas, ke vi devas urĝigi la ekipiĝon per teknikaĵoj.

Paderborn — Somro en januaro 1990
Intervjuis: Atanas ILKOV

NOVA ADRESO

Oni sciigis al ni, ke E-eldonaĵo „La Kancerkliniko” havas novan adreson, nome:

Jak LE PUIL
Lien-dit „Les Cocherats”
F—18210 THAUMIERS
tel. 48-61-81-98

EN NICO

Junaj membroj de la Nica Esperanto-Grupo kreis klubon „Esperanto” en la Nica liceo „Massena”. Unuhora kunveno okazas ĉiun semajnon.

Ĉe loka radio okazas 50-minuta elsendo pri Esperanto.

En Nico funkcias unuagrada kaj duagrada kursoj pri Esperanto.

Je 25 km de Nico, s-ro J.-P. Cavelan, membro de la Nica E-Grupo, ĉiusemajne gvidas duhoran Esperantan kurson al teatra junula grupo, kiu deziras lerni Esperanton por prezenti la teatraĵon „La Ŝtona Gasto”, verko de Prof. Duc Goninaz.

La Nica E-Grupo, post interkonsento kun la dekanato de la Beletro Fakultato, organizis publikan konferencon en iu aŭditorio de la Nica Beletro Fakultato. Tiu konferenco estis anoncita tra la urbo per afiŝoj, elektronikaj lumpaneloj, artikoloj en lokaj ĵurnalo kaj radio.

Profesoro Michel Duc-Goninaz prelegis pri temo „Esperanto kaj la problemoj de la monda interkomuniko” antaŭ pli ol 50 personoj, inter ili dudeko da studentoj. Multajn demandojn faris la studentoj, montrante interesiĝon pri Esperanto.

R. LLORENS

NOVA PERIODAĴO

E-Fondaĵo „Fernando Soler“ de Valencio (Hispanio) sendis al ni la unuan numeron de sia oficiala revuo „INTERNACIA LINGVO“

Temas pri dulingva eldonaĵo (hispana-Esperanta). Tiu ĉi revuo havas diversajn rubrikojn aŭ fakojn: Esperanta Anekdoto, Novaĵoj pri Esperanto, Pedagogia Sekcio, Historio de la diversaj hispanaj grupoj aŭ asocioj, ktp. Oni intencas oferi al la Esperanta aŭ neesperantista publiko, kvalitan laboron.

Tiun ĉi eldonaĵon oni sendas jam al la Esperantaj grupoj kaj asocioj en Hispanio kaj Sud-Ameriko (la plej aktivaj)... kaj ankaŭ al kelkaj asocioj, bibliotekoj kaj gravaj muzeoj, kiel de Eŭropo, tiel ankaŭ de aliaj landoj de la kvin kontinentoj en la Mondo.



LAŬDINDA INICIATO

La 1-an de februaro k. j. la esperantistoj el E-societo „Stefan Min-kov“ ĉe komunumo „Krasna poljana“ — Sofio, kolektiĝis por festi ĝojan eventon — la unuajn foslaborojn por la fundamento de la E-klubejo de sia societo. La merito pri tiu iniciato apartenas al la societa prezidanto Jordan Jordanov, kiu klopodis antaŭ respondecaj instancoj pri disponigo de konstruloko, pri aĉetado de la necesaj konstrumaterialoj kaj pri certigo de konstrulaboristoj.

La klubejo ampleksos salonon por 120 personoj, du kursĉambrojn, kancelaron, bibliotekon-legejon kaj kafejon.

Estas planite, ke la nova E-klubo estu inaŭgurita fine de junio k. j. okaze de la 42-a Kongreso de BEA.

Rumjana GEORGIEVA

JARKUNVENO EN JAMBOL

La 26-an de januaro k. j. en la Junulara Domo en Jambol okazis jarkunveno de la urba E-societo „M. Gorkij“.

La prezidanto de la societo Dimităr Hristov prezentis agadraporton. Dum la menciita periodo la kantgrupoj „Ruĝaj Fajreroj“ kaj „Nuanco“ kun gvidantino Liljana Paraŝkevova estis premiitaj per diversaj distingoj en naciaj kaj internaciaj E-aranĝoj. Esperanta poetino Penka Papazova gajnis unuan premion en la XX Nacia Revuo de E-Kanto kaj Parolo. En 1989 finiĝis du civitanaj E-kursoj de unua grado kaj tri lernantaj E-kursoj de unua kaj dua gradoj. Estis organizitaj Turista E-Renkontiĝo „Bakaĝicite'89“, Zamenhofa Vespere, renkontiĝoj kun eksterlandaj esperantistoj.

Estis elektita nova estraro de la E-societo en Jambol kun prezidanto Dimităr Hristov, vicprezidanto Konstantin Georgiev kaj sekretario Penka Papazova.

Iliana ILIEVA

VETERANA JUBILEO

Antaŭ nelonge en Domo de la Kulturo — Gabrovo, E-societo „Verda Torĉo“ organizis solenaĵon, dediĉitan al jubileuloj-veteranoj.

Gastis Nikola Aleksiev, prezidanto de la sekcio de E-veteranoj.

Maria Avramova, prezidantino de la E-societo, malfermis la solenaĵon kaj prezentis al ni la jubileulojn: Petăr Tjankov — 90-j., la plej maljuna esperantisto en Gabrovo, 60 jarojn E-agado, aktivulo; Anastasia Bruseva — 85-j., 65 jarojn E-agado, respondeculino de la virina sekcio en la E-estraro; Metjo Metev — 80-j., 60 jarojn E-agado, aktivulo, longjara membro de la societa estraro, fondinto de E-grupoj; Neno Janev — 70-j., 51 jarojn E-agado, longjara prezidanto de DE de BEA, multjara E-instruisto en Gabrovo kaj en IEK, aŭtoro de E-lernolibro, kunaŭtoro de Bulgara-Esperanta Vortaro; Ganĉo Radkinov — 60-j., 45 jarojn E-agado, longjara sekretario de la societa estraro, prezidanto de la revizia komisiono ĉe la estraro.

Je la nomo de la estraro kaj de la esperantistoj, M. Avramova dankis al la jubileuloj pro ilia kontribuo por la prospero de la E-societo kaj bondeziris al ili sanon, vigecon kaj longan vivon.

Sonja TIHOVA

Al Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio

Samideanoj,

La krizo en nia socio influis al la strukturo kaj la agado de Bulgara Esperantista Asocio. La demokratiigo de la soci-politika vivo en nia lando postulas tujan neglekton de la komand-administraj metodoj. Nun estas la momento por adiaŭi kun la stagnado.

Dum la okazintaj de la 15-a ĝis la 25-a de januaro 1990 Naciaj kursoj de Esperanto en Vârșec estis diskutitaj la perspektivoj de nia Asocio kaj starigitaj jenaj demandoj kaj proponoj:

1. La Statuto de BEA estu akordigita kun la Statuto de Universala Esperanto-Asocio, kies kolektiva membro ni estas.

2. En la nova Statuto de BEA, same kiel en la Statuto de UEA, oni klare difinu ties neŭtralecon kaj sendependecon de politikaj partioj, de sociaj movadoj kaj de la ŝtato.

3. La esperantlingva nomo de BEA estu korektita de Bulgara Esperantista Asocio al Bulgara Esperanto-Asocio, kiel estas la internacia praktiko. Necesas pripensi pri ŝanĝo de la vorto съюз per асоциация en la bulgarlingva nomo por eviti malbelsonan BEC. Tiel la nova mallongigo BEA fariĝos identa al la esperanta.

4. En la nova Statuto de BEA oni menciigu, ke oficiala lingvo de BEA estas Esperanto, en kiu okazas ĉiuj asociaj kongresoj, konferencoj, kunsidoj, kunvenoj kaj ceteraj aranĝoj, kaj kiu estas deviga por la asocia dokumentaro. La bulgaran lingvon oni uzu nur por kontaktoj kun enlandaj neesperantistaj organizaĵoj.

5. Oni enkonduku diversajn kategoriojn de membreco, ekzemple: plenrajtajn membrojn (kiuj posedas kaj aktive uzas Esperanton) kaj amikojn de la lingvo (kiuj

lernas ĝin). Laŭ la kategorioj ili pagu diversajn membrokotizojn kaj havu garantiitajn diversnivelajn rajtojn. La membroj nepre povu kontroli la agadon de ĉiuj gvidorganoj de BEA. Oni enkonduku la praktikon, ke decido de gravaj principaj problemoj okazu per referendumo kun partopreno de ĉiuj asociaj membroj.

6. Oni garantiu liberan fondiĝon de Esperanto-societoj, kluboj, faksekcioj: ignorinte la altruditan antaŭnelonge teritorian principon. Societoj kaj aliaj organizaj unuoj estu fondataj laŭbezzone, se ekzistas taŭgaj kondiĉoj por ilia agado.

7. La regulaj kongresoj de BEA okazu ĉiun duan jaron.

8. Oni anstataŭigu la nunan Centran Estraron per Komitato, kaj la Buroon — per Estraro, kiel estas en UEA kaj aliaj asocioj. Iliaj membroj agu dum ne pli ol du sinsekvaj oficperiodoj.

9. La komitatanoj kaj la asociaj oficistoj posedu tre bone Esperanton; ĉe elekto aŭ enoficigo oni nepre konsideru ilian lingvokonon. Tio ekestu deviga kondiĉo por ĉiuj gvidniveleoj, inkluzive por la Prezidanto.

10. La Komitato konsistu el tri kategorioj de membroj, kiel estas en UEA.

11. Ekde la 42-a Kongreso de BEA oni enkonduku sinproponadon por estraranoj kaj komitatanoj far apartaj esperantistoj.

12. La estraranoj ne ricevu salajrojn de BEA.

13. En la nova Statuto oni deklaru, ke oficiala organo de BEA estas revuo „Bulgara Esperantisto“. Estu forigita la teksto, kiu ĝis nun reglamentis eldonadon de „Paco“ far BEA.

14. En la Oficejo de BEA laboru minimuma kvanto da salajrataj personoj, kiuj ne estu komitatanoj aŭ estraranoj. Estus racie likvidi la nun ekzistantajn pagatajn poste-

nojn de organizantoj en la nunaj departementoj; ilian agadon transpenu volontuloj.

15. BEA reviziu sian rilaton al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

16. BEA ne plu subvenciu revuon „Paco”.

17. Oni nepre ĉesigu la eldonadon en Esperanto de politika literaturo, al kiu ekzistas neniuj intereso, kvankam ĝi estas dissendata senpage.

18. BEA ekplenumu siajn funkciojn kiel peranto de UEA — akcepton de individua membrokotizo, kongreskotizoj ks, aŭ oficiale rifuzu tiujn funkciojn, por ke ilin transprenu alia instanco. Oni certigu al ĉiu membro eblecon pere de BEA aboni altvalitajn periodaĵojn kaj havigi al si librojn, eldonatajn de UEA kaj de aliaj Esperanto-asocioj.

19. Dum la 42-a Kongreso de BEA oni prezentu detalan raporton pri la elspezoj por la deketaĝa Esperanto-domo en Sofio, kies ekkonstruo estis anoncita antaŭ kvin jaroj, tamen ankoraŭ ne komenciĝis. Dum la plej baldaŭa plenkunsido de CE oni respondu ĉu parto de tiu mono estas uzita por salajroj de la asocia oficistaro; se tio okazis, ĉu estis laŭleĝa kaj bezonata.

20. Dum plenkunsido antaŭ la 42-a Kongreso la Revizia Komisiono prezentu informon pri la ricevataj honorarioj pro

Esperanto-agado en la tuta lando fare de la membroj de la Buroo kaj la salajrataj asociaj oficistoj.

21. Dum plenkunsido antaŭ la 42-a Kongreso la Revizia Komisiono prezentu informon pri la funkcioj, kiuj veturis eksterlanden je kosto de BEA pli ol unu fojon jare. La Prezidanto respondu ĉu estis neceso, ke la samaj personoj vojaĝu kelkfoje.

22. La raporto pri la plenumo de buĝeto por 1989 kaj la projekto de ĉi-jara buĝeto estu disdonitaj al la membroj de CE kaj la societoj.

La inkluzivo de ĉi proponoj en la projekto de nova Statuto de BEA kontribuos por demokratiigo de la asocio vivo, por akordigo de nia agado al la tradicioj de la internacia Esperanto-movado, kiuj ĝis nun estis ignorataj pro la trudita politika protektado.

La respondoj al tiuj ĉi demandoj kontribuos por plibonigo de nia agado, por ke la bulgara Esperanto-movado malfermu novan paĝon en sia jam centjara historio.

Ni pretas ankaŭ estonte kontribui por evoluo de la renovigita Bulgara Esperanto-Asocio.

Vraca, la 28-an de januaro 1990

*Estime:
dr. sc. Kiril VELKOV,
Ljubomir TRIFONČOVSKI,
membroj de CE de BEA*

ALVOKO

de la movado „Esperantistoj por vera rekonstruo”

Rekonstruo en Bulgara Esperantista Asocio preskaŭ ne okazas, kaj la esperantista movado en Bulgario falis en profundan krizon. Tio estas tiel, ĉar:

● Restis netuŝita la altrudita al ni de supre komand-administra kaj burok-

rata sistemo de gvidado, kiu ne deziras aliĝi kaj luktas por sia sinprotektado;

● Ne estis eligitaj el la Buroo de CE de BEA la salajrataj asociaj oficistoj — sekretarioj k. a.;

● **Ne estas en bona stato la organiza vivo de la Asocio, kaj en la esperantistaj societoj mankas aktiva vivo.**

La Buroo de la CE de BEA nur parolas pri rekonstruo, sed nenion gravan faras por demokratiigo de BEA, por enkonduko de plurismo en la laboro kaj plilarĝigo de la informado pri BEA. La Buroo ne kuraĝas diri, ke BEA estas en akuta krizo, kaj tio malhelpas, ke oni faru la necesajn paŝojn por likvido de nia memizoliĝo, por regajni popularecon en la socio, por altiri novajn adeptojn kaj amikojn de Esperanto.

Nin multe maltrankviligas la fakto, ke la proponoj, kiujn faras multe da aktivaj esperantistoj ne estas diskutataj kaj respondataj.

La movado „Esperantistoj por vera rekonstruo”, aganta enkadre de BEA, sin devigas luktadi por rekonstruo kaj ĝi okazadu ne morgaŭ, sed hodiaŭ. Por ke tio estu realigita, ni esperas ricevi apogon kaj kunlaboron de ĉiu societo, klubo kaj esperantisto.

Ni laboros por realigo de aro da iniciatoj kaj aranĝoj, ekzemple:

1. Dum la ĉifebruara kunsido de la CE de BEA, kiu okazos en Pazarĝik, la CE devas fari profundan kritikan analizon de la ĝisnuna rekonstruo kaj la rolo de la Buroo. Ĝi devas renoviĝi kaj eklaboradi sen salajrataj asociaj oficistoj.

2. La memstara kaj neŭtrala BEA klopodu starigi kontaktojn kun organizoj kaj movadoj, kiuj estas pretaj kunlabori por disvastigo kaj aplikado de Esperanto.

3. Ni apogas la proponon, ke la kongresoj de BEA okazadu ĉiujare.

4. Ni kunlaboros, por ke estu ellaborita nova demokratia projekto de statuto, kiu post vasta diskutado estu aprobita dum la 42-a Kongreso de BEA.

5. La tuta agado de BEA devas esti malsekretigita. Oni devas fari jarajn raportojn pri la stato de la Asocio. Ili devas aperadi ankaŭ en revuo „Bulgara Esperantisto”. Tiel ĉiu aktiva bulgara esperantisto povos

esti bone informita pri la stato de la Asocio kaj pri tio, kio estas farata por plibonigo de la agado.

6. Multoble devas pliboniĝi la agado de la asocia oficejo. En ĝi devas laboradi bonaj kaj sindonaj geesperantistoj. Ili estu oficigataj per larĝe diskonigita kaj severa konkurso-ekzameño. Oni devas certigi bonajn kondiĉojn por laboro, sed ankaŭ la laboro tie estu intensa, kvalita kaj rapida.

7. La lernado de Esperanto devas esti fundamente rekonstruita kaj modernigita. Ĉefa celo de BEA devas esti aperigo de bonaj, nuntempaj kaj praktikaj lernolibroj k. a. lerniloj. Tiucele estu organizataj konkursoj, diskutoj k. a.

8. Grandan kaj konstantan atenton oni devas turni al la problemo pri altiro de la junularo kaj ĝia agado en la movado.

9. Ni ĉiuj konstante devas laboradi por vera plialtigego de la lingva nivelo de ĉiuj bulgaraj geesperantistoj. Specialan atenton la asociaj gvidorganoj devas turni al la problemo pri uzado, praktikado kaj aplikado de Esperanto en Bulgario.

10. Necese estas, ke oni fondu aŭtonoman sciencan Esperanto-instituton, kiu okupiĝu pri internaciaj lingvoj kaj Esperanto, pri la historio de la movado. Ĝi devas fari diversajn enketojn kaj eldonadi broŝurojn.

11. Tre grave estas, ke BEA starigu kontaktojn kaj laboru por efektivigo de aranĝoj kune kun Esperanto-organoj en eksterlando kaj kun neesperantistaj organizaĵoj en Bulgario. Por tio povas helpi kaj labori la asociaj sekcioj.

12. Antaŭ la asocia kongreso devas okazi diskutadoj, renkontoj k. a. iniciatoj, por ke estu ellaboritaj bonaj projektoj de dokumentoj, kiujn oni akceptu dum la Kongreso.

Ĉiu, kiu laboras kontraŭ la stagnado de la rekonstruo kaj akceptas tiun ĉi alvokon, povas esti ano de la movado „Esperantistoj por vera rekonstruo”.

01.02.1990

La movado „Esperantistoj por vera rekonstruo”
Poŝta adreso: PK 45, Sofio—C



„Meloideas mi sonetajn kantojn...”

Poeto kaj ĵurnalisto, tradukisto kaj lingvisto, sociaganto kaj dramaturgo, Nikolao Stranganski estas unu el la kolorriĉaj figuroj de bulgara E-movado.


Li naskiĝis en 1932 en vilaĝo Zidarovo, malproksime de urbo Burgas, kaj fariĝis esperantisto tre juna. En 1960—1964 fondas kaj gvidas E-societon „Nova Mondo” en urbo Madan (en Rodopi-montaro) kaj en 1980—84 E-societon „Turisto” en Slânĉev Brjag (Suna Bordo). Li estis multajn jarojn membro de la Buroo de la Distrikta Estraro de BEA en Burgas. Nun li estas prezidanto de Regiona Literatura Unuiĝo ĉe la E-kulturdomo en Burgas kaj membro de Estraro de Literatura Sekcio ĉe BEA. Laboras kiel direktoro de Atrakcia Teatro en Slânĉev Brjag.

Nikolao Stranganski publikigas originalajn versaĵojn en bulgaraj revuoj, gazetoj, almanakoj kaj antolo-

gioj. Liaj tradukoj el greka, germana, rusa kaj franca lingvoj estas distingitaj per oraj kaj bronzaĵoj medaloj. Li estas laŭreato de Nacia Festivalo de Belarta Verkado en 1979. Aŭtoro de teatraĵoj kaj tekstoj de bulgaraj kaj Esperantaj kantoj.

En 1963 Nikolao Stranganski eldonis verskolekton sub la titolo „Pacemo” kun antaŭparolo de E-verkistino Marija Jageto. Liaj E-versaĵoj aperis en „Bulgara Esperantisto”, „Nuntempa Bulgario”, „Norda Prismo”, „Paco”... Liajn sonetojn disaŭdigis la dissendoj de la radiostacioj en Varsovio, Pekino kaj Berlino. Tradukas en Esperanton bulgaran popolan ampoezion kaj verkojn de poetoj el nigramara regiono.

Preferata versformo de Nikolao Stranganski estas la soneto — la plej eleganta kaj plej malfacila formo, kiu ebligas la poeton esprimi koncize kaj forte poezie siajn sentojn. La prezentitaj tie ĉi verkoj estas



el la preparata por eldono soneta kolekto. Al poeteca soro!

Venelin MITEV

Nikolao STRANGANSKI

FRINGELA SONETO

*Meloideas mi sonetajn kantojn pri la am' tenera,
pri virino malfidela, pri perfido kaj divido,
pri flugilo kokcinela kaj pri farbo de irido
aŭ pri iu pli konkreta — ĉio estas efemera.*

*Nur la melodio restas,
kiel eĥo en animo,
kiel unu sona rimo,
kiu amon nun sugestas*

*kaj la sencon de la homo nur en unu vort' digestas;
kaj pro tiu anapestas
la poeto je la nomo*

*de la dioj en ĉielo, de l' diabloj sur la tero:
kvazaŭ estus mi fringelo, kiu kantas sur hederolo!*

* * *

Antoksantoj — en ĝardeno: la aŭtuno estas ĉarma —

*la aŭtuno de la vivo — la somero jam foriris
kaj por ni alternativon plu ne povas ni aspiri.*

Kaptis ni la korifenon en la laga akv' malvarma.

*Tri dezirojn ĝi plenumos
al ni. La unua estas:
ni atingu Evereston
de la vivo kaj gustumi*

*guton da libero homa,
guton da prudenta volo;
unu voko de kukolo
veku la printempan domon,*

*ĉar la homoj estas fratoj kaj egalaj estas ili.
Ni dezirus: la klematoj per odoro nin enfili!*

* * *
*Eleksiro de la vivo — tiu estas ruĝa vino:
 ruĝa, kiel la aŭroro — klara, kiel monta lago —
 pura, kiel homa gloro — dolĉa, kiel kampa frago —
 eleksiro de la viro — tiu estas la virino!*

*Estas ĝi feliĉo nia — Eleksiro de l'diurno —
 rido, larmo kaj mensogo, la okuloj de l'virino —
 fido, falo kaj apogo, akraj, kiel gilotino —
 kalumnio kaj envio; novaj, kel la alburno;*

*Tiu viva eleksiro, tiu mia emersio
 estas unu granda miro kun frapegoj en tempio!*

EGEA SONETO

*Estas vigla mi, ĉar estas vino kaj mi estas en taver-
 no olda.*

*La velŝipo de la kanto naĝas, forportante min en
 la maron bluan.*

*Mia ravo estas en kulmino, en l'animo la mallumo
 holdan*

*historion ian nun mesaĝas kaj la vorto estas su-
 perflua.*

*Nun malgajas la velŝipo pri la
 maro — kaj la viro pri virino,
 aŭ pri unu nova kanto brila
 de la mezonokta okarino.*


*Nokta sonĝo kaj vizio ĝia,
 la maldormo de la pulso kora,
 fideleco kaj perfido kora —
 ĉio estas kvazaŭ malracia.*

*Super la aliaj falos pekoj, ĉar noktumas kun edzi-
 noj siaj;
 kvazaŭ estus ili oldaj grekoj antaŭ oldaj sanktuli-
 noj piaj!*


DU OKTAVOJ

*Aventuron mian vi pardonu,
 la somerpejzaĝon vi forgesu,
 kara, kaj ĵaluzi min vi ĉesu
 kaj ne konsideru min fripono.
 La fripono vin ne povas ami,
 la fripono estas homo friska.
 Nur mi povas por vi ĉion riski,
 perdi ĉion kaj vin ne kondamni!*

*Vekas min laŭtvoĉe merlo,
 estas la mateno friska.
 Via amo odaliska
 nun briletas kiel perlo
 kaj varmigas mian koron
 plena je elan' barbara
 dum la frumatena horo
 en kabano apudmara!*



Grafikaĵo: Anton PETKOV



Vasil Kinov naskiĝis la 28-an de majo 1940 en Orešak, regiono de Trojan. Li finis bulgaran filologion en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“ kaj poste laboris en „Strojrajon“ — Trojan, „Balkanturist“, Bulgara Televido, Bulgara Kinematografio. De 1975 li estras fakon „Kulturo“ de gazeto „Zemedelsko Zname“ (Agrikultura Standardo). Li tradukis el pola en la bulgaran „Kiberiada“ de Stanislaw Lem, rakontojn kaj novelojn de Tadeuŝ Ruĵevič, Sl. Mrojek, J. Andĵievski k. a., pro kio oni atribuis al li titolon „Merita Aganto de Pola Kulturo“.

Li eldonis la librojn: „Ne atendu la subiron“ (rakontoj, 1976); „Rajdanto. Dajlada“ (noveloj, 1981); „Floro de kormentil“ (noveloj, 1983); „Sezono de ĉasado“ (rakontoj kaj noveloj, 1987); „Horloĝo kun pasinteco“ (novelo, 1986); „Kasteloj laŭ elekto“ (romano, 1987); „Tenereco por la fuĝinto“ (romano, distingita per dua premio de eldonejo „Ĥr. G. - Danov“ — Plovdiv, 1988).

Ĉi-momente estas presataj liaj romanoj „Kasteloj laŭ elekto“ — unua kaj dua partoj, kaj „Virino sen korpo“.

„BE“

La Granda Bojan

Vasil Kinov

+++

Antaŭ la sunsubiro, mi vidis la herbejon kun eterna geranio kaj ekkuris al la adoba domo kun tegmentplatoj surkreskitaj de musko. Mi malfermis la pordon kaj aŭdis la longdaŭran tuson de la Maljunulo.

— Saluton, avo!

La Maljunulo bonvenigis nin, dispuŝetis la fajron en la fajrujo, pendigis super ĝi kaldronon kun freŝa lakto kaj sidiĝis sur la tripedan seĝeton.

— Ĉu venis viaj familianoj? — La Maljunulo ŝajne ne aŭdinte min, fingrogratis sian genuon.

— Iu saĝa homo diris al mi antaŭ jaroj: „La malfeliĉo trafas la virojn en la koron, sed la virinojn — sur la korpon“... Miaj filoj tute ne estimas min. La pli juna venis antaŭ du jaroj, restis tri-kvar tagojn, prenis iujn aĵojn... Li ja ne emas resti sur iu loko... Ĉu ili malamas min, ĉu mi malbonan vorton al ili diris — mi ne scias! Mi paŝtas la ŝafojn kaj pensas, ke nur ili iun tagon blekos pri mia morto. Ne estas bone paroli tiel, sed...

— Tio, kion vi diras, avo, estas tre kruela, sendepende pri kiu temas — Emo Korev diris.

— Tiel mi parolas, tiel... Jen tie estas la tombo de ilia patrino... De kiam ŝi forpasis, trifoje ili revenis... Dio absolvu ŝin.

— Ĉe vi estas bonege! — neatendite ekkriis Mimi kaj ekridetis al la Maljunulo.

— La freŝlakto tuj estos preta, por ke vi trinku, ĉar rigardante vin, knabino, ŝajne nur akridojn vi manĝas...

+++

La Maljunulo filtris la freŝlakton, poste prenis tri pelvetojn, metis ilin sur la malaltan tablón, pecetigis panon kaj salis ĝin. Ili ambaŭ kliniĝis al la varmaodoro de la lakto. „Mi ne lavas ĉi tiujn malbenitajn pelvetojn, ĉu nur pri ili mi okupiĝu, mi kovras ilin, por ke la muŝoj ne alflugu ilin...“ — la Maljunulo ĉiam pardonpetis, sed nun li ne faris tion.

— Unu pelveto por iu kruro, dua pelveto — por la alia! — li kriis, kvazaŭ ni estus surduloj...

Malforta ruĝo ekglitis sur la vaksaj vizaĝoj de ambaŭ. Ili ne perdis la ageman maljunulon el sia rigardo. Tra la malgranda fenestro en la duonluman ĉambron penetris pala lunradio kaj falis sur la krurojn de la knabino.

Tuj post kiam ni bruligis fajron antaŭ la domo, ĉio ĉirkaŭe reviviĝis: la arboj, la herbejo, la geranio, la ŝafejo. Ni trinketis brandon kaj etendis brakojn al la krakanta ŝtiparo. La nura ĉirkaŭanta nin bruvo venis de la fajro, kaj de tempo al tempo ankaŭ de iu sekiĝinta arbo, falanta sur la humidan foliaron.

Subite aŭdiĝis ekkrio, la sono kvazaŭ eliĝis el sub la tero. Tiu ĉi grumbla voĉo apartenis nur al la Granda Bojan, proksimume mia samaĝulo, kiu loĝis je unu-du kilometroj de tie ĉi, ĉe „Kralimarkova manĝotablo“. Post la dua ekkrio mi estis tute certa, ke li estas.

De kvin jaroj la Granda Bojan restis sola, torgesita de la homoj, kaj ankaŭ li forgesis pri ili... Iun tagon, estante proksimume dekkvinjara, pluvegis. Liaj gepatroj sin kaŝis sub soleca fago, ŝafaro ĉirkaŭe staris kapdirekte al la arbo. Subite fulmo trafis tiun arbon, la ŝafoj diskuris, kaj la du hundoj, maltrankvile bojante alkuris la domon... La Granda Bojan postkuris la hundojn, kaj antaŭ li, kiel blanka rivero — la ŝafaro disiris en ĉiuj direktoj. La pluvo falis sur la vizaĝon kaj la nudan bruston de la Granda, trahakis lian rigardon, sed li ne palpebrumis, en liaj okuloj furiozis akvofaloj... La Granda Bojan vidis sian patron kaj sian patrinon, mortfalintaj unu apud la alia ĉe la arbo — altega karbo ĝis la ĉielo, — li eksvingis senfortajn brakojn sub la pluvo. La Granda Bojan falis apud ili sur la malsekan herbon. La pluvado delonge ĉesis, kaj la suno pendis supre en la ĉielo, kiam la Maljunulo trovis lin.

Nun du lignaj krucoj protektas la domon. La Granda Bojan plantis arbar-florojn sur la tomboj kaj se iu demandas lin, kiel okazis la akcidento, li alrigardas per siaj arbaroverdaj okuloj, kurbigas sian grandegan korpon kaj el lia buŝo eliras peza, subtera sono, tintanta en la ŝtona „Kralimarkova manĝotablo“...

La Granda Bojan haltis ĉe la alia flanko de la fajro, metis sian pezan manon sur la kapon de la apude staranta hundo. Li ekridetis, kaj la fajro eniris lian buŝon kaj lumigis lian brunan vizaĝon. La verda arbaro sub la palpebroj englutis la knabinon kaj enigis ŝin en la labirinton el folioj, herboj kaj arboj, filiko kaj torentoj. Mi havis la senton, ke post momento en ĉi tiu arbaro ekpluvegos kaj la fajro estos estingita. Emo Korev ektremis apud mi, kvazaŭ la fajro-regno estus rigidigita de glacio. La knabino paroladis kun la Maljunulo kaj ĉiam pli eniris en la verdan arbaron.

Iom poste Emo Korev min demandis kial la Granda tiel ekrigardas Mimi. Mi klarigis al li, ke por la unua fojo li vidas virinon, kaj jen kia belulino, sed alie Bojan estas bonulo kaj nenio danĝeriga estas...

La larĝa rideto de la Granda pasis tra la fajro kaj falis sur nin. Nur Emo Korev ne eltenis ĝian pezon. Lia silento ĉiam pli etigis lin, kaj finvespere li kvazaŭ malaperis. Mi pensis, ke se la aliaj tri ĉeestantoj estus religiaj, li estis konstruonta statuon de la diablo.

— Avo — la Granda Bojan diris, — buĉu ŝafidon por regali la homojn. Morgaŭ mi donos al vi iun el la miaj, se mi promesas — vi bone scias...

— Bone, sed vi buĉu, car mi ne povas. La mano, tiu fiaĵo, doloras. Mi devos surmeti sur ĝin cep-bandaĝon.

— He-ej — la Granda Bojan ekkriis kaj per du saltoj eniris la ŝafejon.

Iom poste li aitrenis je la malantaŭaj kruroj iun malgrandan blekantan blankan saketsimilan ŝafidon, ekstaris sur la monteto super la fajro, la luno delonge estis malaperinta, ekserĉis per okuloj la knabinon kaj malkovrinte ŝin, turniĝis dorse, levis sian manon — kaj per unu

„Kralimarkova manĝotablo“ — nomo de loko



Grafikaĵo: Anton PETKOV

apenaŭ videbla frapo igis la ŝafidon ŝrumpi inter liaj kruroj. Poste per tranĉaj, precizaj movoj li komencis malvesti la lanugmolan veston, pendigis ĝin je malalta arbo, tranĉis pecon da viando, levis ĝin atente sur pintigita vergo kaj enŝovis ĝin en la fajron. La sanganta viandpeco ekvolviĝis, ĝis fine tiriĝis kaj eksimilis al la flamoj. La Granda eltiris ĝin kaj sekvante per rigardo la knabinon ĉiam pli kaj pli profunde eniris en la arbaron, donacis al ŝi peceton da viando, kiu „fajreris“ antaŭ ŝiaj larmantaj okuloj. Ŝi ankoraŭ ne povis rekonsciiĝi pro la vidaĵo kaj per tremantaj lipoj ekblovetis la pecon. Kaj post kiam ŝi deŝiris pecon de la plej sukoriĉa parto kaj fandis ĝin en sia buŝo, ŝia paleco malaperis. Emo Korev leviĝis, liaj brakoj ekpendis en la aero.

— Se mi estus je via loko, mi ne rigardus ĉi tiun sovaĝaĵon! — li diris mallaŭte al Mimi kaj provis apogi sian ŝultron al la ŝia. — Pro kio vi tiel gapas al li...

Ŝi probable ne aŭdis lin. Eĉ ne unu parto de ŝia vizaĝo elmontris, ke tiuj vortoj rilatas ŝin. Ŝi rigardis la fajron tiel, kvazaŭ tie estus trezorejo, nealirebla por Emo Korev.

La Maljunulo ĵetis lignon en la ardaĵon, enŝovis vergon en ĝian mezon kaj ĝin flamigis. La ligno eksiblis kaj ekĵetis fajrerojn al la mallumo. Sur la vizaĝo de Maljunulo ridetoj kuris al la anguloj de liaj okuloj. Li enverŝis flavan brandon en la glasojn, plej multe por la Granda, kaj rigardis lin fiere, kvazaŭ ĉio, kion Bojan faras, estus farita de li. La Granda trinkis kaj en lia konscio, tra la verda arbaro pasis fulmoj, kiuj ne mortigis la knabinon, male, ili karesis kaj dormigis ŝin sur la filiko, fulmrapide ŝiris bukedojn el fragoj kaj tenere metis ilin en ŝian sinon.

Estis postmeznokte. La Maljunulo memorigis al la Granda Bojan, ke li devas iri kontroli la ŝafojn, io danĝera povus embuski ĉirkaŭ la ŝafejo, kaj la gastoj estas lacigitaj pro veturado — estas tempo, ke ili kuŝiĝu. La Granda vokis la hundon, demetis malantaŭen la falintan sur sian frunton hararon kaj ekridetis. Iom poste liaj paŝoj faligadis ŝtonojn sur la vojeton.

Ni estis ekdormantaj en la silenta nokto. Emo Korev turniĝis en la lito. La Maljunulo, malferminte la buŝon, ronkis, kaj lia vizaĝo estis trankvila kiel tiu de infano. Ĉirkaŭe io kraketis, aŭdiĝis kriegoj de birdoj, kaj la tri hundoj eligis avertan bojon direkte al la arbaro... Mi ellitiĝis por malfermi la fenestreton kaj ekvidis ĉe la granda kverko antaŭ la domo la Granda-n Bojan kaj Mimi. Ŝi karesis la timigan hundon de la Granda. Mi ne ekkredis je miaj okuloj. En la sekva momento la mallumo kaŝis ilin...

Matene ni rapidis al la aŭtomobilo, ĉar nuboj kiel nigraj kurtenoj kaŝis Balkanon. La Maljunulo al ni donacis sekigitajn kornusfruktojn por vojaĝmanĝo kaj diris, ke baldaŭ atendos nin denove, ĉar li ne scias kiom longe li pluvivos.

Ni enaŭtiĝis. Emo Korev eksidis malserena kaj silenta malantaŭ la stirilo kaj post kiam liaj manoj kaj piedoj ektuŝis la ŝlosilojn kaj pedalojn, li denove sin eksentis memfida. Ĉe ambaŭ flankoj de la vojo la arbara ĉirkaŭaĵo dronis malsupre, kaj la arboj kuris, malsupreniĝis ĉe la fono de la montaro kaj disŝmiriĝis sur la aŭtovitroj pro la unuaj falintaj gutoj. Mi ekpensis kiel stulte, kiel tro stulte estis, ke ni trio estis en tiu ĉi aŭto...

Post kelkaj monatoj mi renkontis Mimi. Ni ekmarŝis malrapide preter la malpura, dispuŝita neĝo en nekonata direkto kaj dum tiu mallongdaŭra promenado mi eksciis, ke ŝi ne edziĝis kun Emo Korev, ili kverelis pro io... Demandinte, ĉu al ŝi plaĉis en Balkano, la vaksa paleco forkuris de sur ŝia vizaĝo. Ŝi malfermis sian mansaketon, longtempe traserĉis ĝin, finfine eligis velursaketon kaj antaŭ mi ekbrilis la lanugecaj folioj de edelvejso.

— Ĝin donacis al mi Bojan — ŝi diris, — tiam... tiunokte...

Mi estis vidanta la verdan arbaron de la Granda Bojan... La montardekklivo disetendiĝas malsupren, malkovriĝas vojetoj, kaŝitaj de altaj herbejoj kaj disaj hakterenoj. Mimi kaj la Granda alpaŝas en la silenta aero, la roso estis malsekiginta iliajn krurojn ĝis la genuoj. La Granda Bojan kondukas la knabinon tra la vojetoj, inter la filikoj, tra herbejoj, preter la longaj vicoj de silentaj arboj, en iliaj manoj bukedoj el fragoj — ruĝaj sunoj. Supre, sur la roko de „Kralimarkova manĝotablo“, floras edelvejso.

Babilono vivas

En vico de korespondaĵoj el Irako nia kunlaboranto Georgi Miĥajlov, laboranta tie, prezentis diversajn erojn el la historio kaj la nuntempo de tiu lando de antikva Babilono, kiu ludis gravan rolon en la historio de la homaro. Tie havis lokon ankaŭ la legendo pri Babelturo, dum kies konstruado la homoj plu ne povis interkompreniĝi pro lingva diverseco.

Fine de septembro 1987 en Babilona Teatro okazis Unua Internacia Folkloro Festivalo, kaj post unu jaro, en 1988, okazis la dua laŭvica festivalo. Lige kun tio G. Miĥajlov, kiu ĉeestis ambaŭ festivalojn, vizitis Ministerion pri Kulturo de Irako kaj interparolis kun **Munir**



S-ro Munir Baŝir, Georgi Miĥajlov kaj la tradukistino f-ino Uj-dad

Baŝir, konsilisto de la Ministerio, komponisto de la tradicia araba muziko kaj

vicprezidanto de la Internacia Muzika Komitato ĉe Unesko.

— **S-ro Baŝir**, kian utilon alportis la ambaŭ folkloraj festivaloj al la kultura vivo de Irako kaj al la tutmonda kulturo?

— *Irako ne estas turisma lando. Kiel heredanto de la alta kulturo de antikvaj civilizacioj Irako fakte estas kultura lando. Sur ĝia teritorio iam floris la kulturo kaj arto de la homaro kaj nun per tiuj festivaloj ni volas elvoki tiun kulturon kaj evoluigi ĝin. La festivaloj estas humanaj kaj per si mem kontribuas por la altigado de la iraka kaj tutmonda kulturo.*

— Kiel ekestis la ideo pri tiuj festivaloj kaj kia estas ilia celo? Kion volas diri la partoprenantoj unu al la alia?

— *La ideo naskiĝis ĉi tie, en la muzika fako de la ministerio. Ĝi aperis spontane. Pli ol ok jarojn nia popolo militas kaj per la muziko ni celas demonstri al la mondo, ke ni volas vivi en paco kun ĉiuj popoloj. Sa-*

dam Hĵusein — la prezidento de nia lando sen kontraŭdiro aprobis kaj subtenis nian ideon. Aparte Unesko gratulis nin.

Per tiuj festivaloj ni volas proksimigi al nia popolo la kulturon de la aliaj nacioj kaj krei kontaktojn kun landoj, kun kiuj ĝis nun ni ne havis similajn rilatojn. La festivaloj montras la kulturon, sed ne la historion de la diversaj popoloj. La homoj plej ofte serĉas kulturon, kaj ne historion. Cetere la kulturo kaj la historio kunfandiĝas.

Preskaŭ ĉiuj muzikaj instrumentoj en Irako devenas de la antikveco. Nun ni strebas kaj serĉas vojojn alproprigi la muzikon de niaj antaŭuloj. Ni strebas rekrei la kulturon de la antikva Babilono, ĉar iam la tuta homaro strebis atingi ĝin. Nun nia lando rekonstruas la palacojn de la iama Babilono. Ni komprenas, ke la nuna mondo ne disponas pri la iamaj altkvalitaj konstrumaterialoj, sed tio ne senesperigas nin. Nia celo estas per la internacia muziko kaj per la re-

konstruado de la muregoj rekrei Babilonon de Hamurabo. Babilono estas lulilo de monda kulturo kaj per la internaciaj festivaloj ni volas amikigi la homojn. Per la muziko la homoj el ĉiuj landoj volas interkonatiĝi. Ili dancas kaj kantas pri paco kaj amikeco, pri amo. En Babilono la homoj montras sian folkloron, sian kulturon.

— Bagdado estas centro de la nuntempa iraka kulturo. Kial do la internaciaj festivaloj ne okazis en la ĉefurbo, sed en Babilono, situanta je 80 km for de Bagdado?

— Babilono estas historia loko kaj ĉiu povas viziti ĝin. Se la internaciaj festivaloj okazus en Bagdado, do tio signifus, ke ni volas altrudi nian nacian kulturon al la aliaj nacioj. En Babilono la kulturo de la diversaj popoloj fariĝas internacia kulturo, monda kulturo.

— De miaj vizitoj al la ambaŭ festivaloj mi komprenis, ke ne nur la artistoj estis el diversaj landoj. Multaj el la spektintoj parolis en diversaj lingvoj. En kiom da lingvoj kantis la plenumantoj? Ĉu la publiko komprenis ilin?

— Muziko estas arto kaj oni ne bezonas lingvon por kompreni ĝin. La muziko estas milda arto. Oni devas senti la muzikon. Kiu ne komprenas ĝin, tiu ne sentas la pulson de la vivo. La muziko de la diversaj popoloj similas unu al la alia. En la mondo nur la klimato estas malsama.

— Kaj ankaŭ la lingvoj.

— Ho, jes! La multlingveco fakte staras kiel fera krado inter la homoj. Vere ĝi malutilas.

— Laŭ la legendo dum la konstruado de Babelturo la Eternulo konfuzis la nuran lingvon de la tuta Tero. Ĉu antaŭ tio la homoj estis feliĉaj?

• — Laŭ mi la homoj sentas la feliĉon, kiam ili estas sanaj, kiam mankas militoj. Muziko kaj komuna lingvo!? Mi ne scias ĉu tio sufiĉas, por ke la homoj estiĝu pli bonaj, pli prudentaj.

— Sed en la mondo ekzistas la internacia lingvo Esperanto. Ĉu vi scias ion pri tiu lingvo?

— Jes. Antaŭ trideko da jaroj mi studis en Hungario. Tie mi aŭdis pri Esperanto. La lingvoj estas naciaj. Esperanto tamen estas neŭtrala lingvo. Mi estas „por” ĝi.

Tuj mi volas aldoni ion alian! Por la landoj de la Proksima Oriento Bulgario estas pordo al Eŭropo. En 1959 mi faris viziton al Varna, Burgas, Târnovo, Sofio... Hazarde difektiĝis mia aŭto. La difektita peco ne estis trovebla en Bulgario, sed bonaj homoj ellaboris ĝin. Mi amas Bulgaron! En ĝi mi ege ŝatas manĝi karamelan kremajon.

— Ĉu en Babilono okazos aliaj internaciaj festivaloj?

— Jes. En septembro 1989 en Babilono okazos la Tria Internacia Folkloro Festivalo. Mi esperas, ke okazos ankoraŭ multaj festivaloj. Ĝis nun prezentigis sesdeko da landoj, kaj ankoraŭ pli ol sepdek faris proponojn. Fine mi dezirus bondeziri al ĉiuj legantoj de „BE” pacon, sanon kaj ĝojon! La revuo disvastiĝu en 130 landoj kaj pli ofte rakontu pri la arabaj landoj, pri ties arto kaj kulturo.

— En la nomo de la Redakcio de „BE” mi gratulas vin okaze de via 60-jariĝo kaj bondeziraj al vi fortikan sanon, ĝojon kaj multajn kreajn sukcesojn en la komponado de tradicia araba muziko.

Ĉe la adiaŭo Munir Baŝir faris al mi karnaj donacojn: kasedon kaj gramofondiskojn kun lia muziko kaj ankaŭ aliajn memoraĵojn. Mi forlasis la Ministerion pri Kulturo kontenta kaj feliĉa—kontenta, ĉar mi efektive vigis verŝajne la unuan en la historio de Esperanto intervjuon pri Babilono kaj feliĉa, ĉar samtempe mi portis la kulturon de nuntempa Irako kaj la kulturon de antikva Babilono.

24.1.1989
Bagdado

Intervjuis: Georgi MIHAJLOV

Kooperativa instruado en USSR

En USSR ne ekzistas unueca sistemo de Esperanta instruado. Malgraŭ ĉiuj mankoj de tiu stato, la ĝenerala lingva nivelo de la sovetiaj esperantistoj estas sufiĉe alta. Kiu do instruas? Instruas apartaj esperantistoj, kiuj havas fortojn kaj eblecojn organizi kurson. Oni kutime organizas kursojn surbaze de kulturdomoj (urbaj, uzinaj ktp.) aŭ korespondajn kursojn. Sed por ĉiuj similaj kursoj tamen konstante aperas unu granda obstaklo: manko de lerniloj. Por unuopulo, kiu gvidas kurson, eĉ se al li helpas lia loka esperantista societo, tiu obstaklo estas praktike ne konkerebla. Pro tio, kiam aperis taŭga leĝa ebleco, esperantistoj-instruistoj komencis organizi specialajn kooperativojn, en kies kadroj eblas unuigi fortojn kaj, almenaŭ parte, solvi problemon de lerniloj. Nun en diversaj sovetiaj urboj ekzistas jam kelkaj tiuspecaj kooperativoj. La unua aperis en Moskvo, en majo de 1988. Ĝi havas titolon „Kopso” (forstista termino, signifanta „junajn, kreskantajn arbojn en arbaro”): Kaj pri ĝia agado kaj sperto mi volas kelkvorte rakonti.

En la kooperativo unuiĝis kelkaj instruistoj, kiuj celis profesiigi instruadon de Esperanto, ĉar kutima amatora nivelo ne donas eblecojn sufiĉe disvastigi nian lingvon. Kvankam nia instruado baziĝas sur la rusa lingvo, inter niaj lernantoj estas ankaŭ homoj el diversaj respublikoj, precipe el tiuj,

kie ne ekzistas forta E-movado kaj korespondaj kursoj en naciaj lingvoj. Plejparte ni okupiĝas pri korespondaj kursoj, tamen en kaj apud Moskvo ni gvidas ĉeestajn kursojn.

La kooperativo ebligas siajn instruistojn eldoni en necesa kvanto lernilojn. Niaj instruistoj verkas lecionojn, kiuj estas dissendataj al la lernantoj. La tuta kurso estas dividita je 3 partoj, ĉiu parto konsistas el 12 lecionoj. La lecionoj estas sufiĉe ampleksaj (10—15 paĝaj), do la tuta lernolibro enhavas ĉirkaŭ 500 paĝojn. Post la unua parto de la kurso niaj lernantoj jam kapablas korespondi pri facilaj temoj, post la dua — libere korespondi kaj legi. La tria parto edukas ilin kiel verajn esperantistojn, donante sciojn pri interlingvistiko, historio de la E-movado kaj Esperanta literaturo.

Krom la lecionoj, ni sukcesis eldoni koncizan „Esperanto-rusan kaj rusan-Esperantan vortaron” kun gramatika skizo (kompilis S. Koncelovskij). La vortarojn ni ne nur sendas al niaj lernantoj, sed ankaŭ vendas al aliaj kursgvidantoj, kio estas por ili granda helpo, ĉar, kiel mi menciis, nun aliaj lerniloj kaj vortaroj praktike ne aĉeteblas.

Por dezirantoj el niaj korespondlernantoj, kiuj volas perfektigi sian parolkapablon, ni organizas somerajn renkontiĝojn, kun prelegoj, ekskursoj kaj koncertoj pri kaj en Esperanto.

Por la korespondemuloj ni organizis „Interservon” — adresaron de eksterlandaj esperantistoj. Se iu el la bulgaraj samideanoj volas korespondi kun nova sovetia esperantisto, bonvolu skribi laŭ la adreso: **SU—115372, Moskvo, Birjulovskaja ul. 53, korp. 1, kooperativo „Kopso”, „Interservo”,** kaj ni nepre trovos por li taŭgan korespondanton kaj estontan amikon.

Nikolao GUDSKOV,
Moskvo

Rememoroj pri Vasilij Eroŝenko

... Tio okazis en junio 1921. Ricevinte la ordonon de japana registaro pri elpelo el la lando, la blinda rusa poeto Vasilij Eroŝenko forlasis Japanion.

Tiujare en Japanio oni la duan fojon celebris la Feston de Laboro — la Unua de Majo kaj pro partopreno en la manifestacio Eroŝenko estis malliberigita en la kvartal-policejo de Mita. Kaj post kelkaj tagoj, la 9-an de majo, li partoprenis la Duan Kongreson de Socialista Ligo en Japanio. La rezulto — nova dutaga aresto en ĉelo de la Ĉefa Administrejo de Polico.

La 28-an de majo Eroŝenko ricevis ordonon pri elpelo kaj la 3-an de junio li estis elpelita el la haveno Curuga al Vladivostok. Tiel finiĝis la pli ol sepjara restado en Japanio de la blinda verkisto el Rusio, kiu tre amis japanojn kaj kiun tre amis same multaj japanoj...

Kun Ero-san (tiel ni nomis Eroŝenko-n) mi konatiĝis dank' al Akita Udzjaku.¹ Tiu-tempe mi preskaŭ ĉiutage vizitadis la hejmon de Akita, kien ofte alvenadis ankaŭ Ero-san. Se estis bona vete-

ro, ni havis kutimon promeni ĝis la tombejo Dzosigaj, kaj ĉiufoje Ero-san ripetadis: „Kia bela loko!” Se oni rigardis lin de malantaŭe, oni ne povis eĉ pensi, ke li estas blinda — tiel certa kaj firma estis lia paŝmaniero.

Estis fondita precize tiu-tempe la rondeto „Cuti-nokaj” („Tero”) sub la gvido de sinjoro Akita. En tiu ĉi rondeto de arta legado oni laŭtvoĉe legis kaj analizis novajn verkojn de la japana kaj okcidenta dramaturgio. Ni kunvenadis 1—2-foje monate sur la dua etaĝo de la magazeno Nakamuraja, ĉe Sjundzjuku. „Cuti-nokaj” estas la fondiĝo de „Progresema teatro” — „Sen-kudza”, kiu siavice enspirigis vivon je tiaj teatraj trupoj kiel „Toranku gekidzjo”, „Dzenejdza”, „Puroretaria gakidzjo”, „Sajoku gekidzjo”.

La kunvenojn de nia rondeto partoprenadis la mastri-no de la magazeno sinjorino Kuromicu Soma kaj ŝia filino Tikako. Konstantaj aŭskultantoj estis la mastro mem, s-ro Ajdzo Soma, kaj Eroŝenko. Oni devas diri, ke geedzoj Soma, en kies domo loĝis Eroŝenko, tre favore rilatis, kortuŝe zorgis pri li... La kritikaj rimarkoj de Eroŝenko al tiu aŭ alia sceno kutime estis akraj, kategoriaj. Li ne indulgis eĉ sian bonfaranton Kuromicu. Mi klarigastion jene: senigita je vidkapablo Eroŝenko konfidis nur

al sia aŭdosenso kaj li scipovis precize kapti la esencon de la replikoj de diversaj roloj, kiujn ni legis — esencon iufoje sufiĉe profundan.

Kiel vivis Eroŝenko, post kiam li devis forlasi Japanion? Estas konata fakto, ke en 1932 li renkontiĝis kun japanoj en Parizo dum la Univesala Kongreso de Esperanto. Post la elpelo el Japanio li trafis Ĉinujon, instruis en Pekina Universitato. Poste li revenis la patrolandon, laboris en la Universitato por laboruloj de Oriento kaj en la lernejo por blinduloj en Moskvo. Li mortis la 23-an de decembro 1952.

Rememorinte Eroŝenko-n, oni ne devas forgesi pri liaj meritoj en la sfero de Esperanto. Ili estas multegaj. Mi citos nur la vortojn de sinjoro Akita: „Kiam mi plene malesperis kaj perdis la kredon vivi, en mia vivo aperis Vasilij Eroŝenko. Mi eksciis, ke li, tute blinda homo, kun grandega entuziasmo laboras je la bono de tutmonda E-movado. Mi tuj komencis studi Esperanton... Kaj antaŭ mi malkovriĝis vasta kampo por utila agado...” Mi por ĉiam konservis en mia animo la memoron pri la altkreska blondulo, kiun ni nomis Ero-san.

Takamaru SASAKI
Esperantigis: Nadija ANDRIANOVA,
Kievo, USSR

1) Akita Udzjaku (1883—1962) — unu el kreintoj de la nova japana dramo. (Rim. de la tradukistino).

LA NOVA NOMUMITO

Provinca urbo. Arestita krimulo. Polica komisaro komisias al la ĵus nomumita juna ĝendarmo eskorti la arestiton al la departementa urbo. La veturo okazos per trajno.

La ĝendarmo kaj la arestito trairis piede la centron de la urbo. Proksime antaŭ la fervojstacio ambaŭ piedirantoj haltis antaŭ mezgranda restoracio. La arestito alparolis la ĝendarmon.

— Mi krevas pro malsato. Ĉu vi, bonkora nobla policano, degnos permesi al mi eniri en la restoracion aĉeti kelkajn bulkojn?

Profunde tuŝita de la ĝentila alparolo, la policano, en kies brusto pulsas kompatema koro, ne rifuzis al la arestito. La krimulo eniris, la ĝendarmo restis atendante

antaŭ la pordo de la restoracio.

Pasis deko da minutoj. La eskortato ne revenas. La ĝendarmo eniris la restoracion kaj demandis la kelneron:

— Antaŭ kelkaj minutoj tien ĉi eniris junulo por ion aĉeri. Ĉu vi ne vidis kien li malaperis?

— Hmmm, jes, jes, mi rememoras. Li aĉetis bulkojn kaj eliris tra la malantaŭa pordo, rigardanta al la korto.

Vane la ĝendarmo provis trovi la spurojn de la fuĝinto.

La trian tagon post la eskapo la krimulo estis denove arestita. Duan fojon la komisaro komisias al la juna ĝendarmo eskorton, akcentante pri plej severa atento.

Trainte la urbon, la duopo haltis antaŭ la sama restoracio. Al la peto de la arestito

pri ion aĉeti, la ĝendarmo krude replikis:

— Ne, ruzulo kara, hodiaŭ vi ne sukcesos trompi min! Mi eniros en la restoracion kaj vi atendos ekstere sur la trotuaro.

Kaj li enŝovis sin en la restoracion.

Kiril DRAJEV

GLOSOJ:

esporti — *akompani por gardi iun (arestiton) aŭ ion;*

nomumi — *enoficigi;*

degni — *bonvoli;*

prefekto — *supera policisto;*

departemento — *administra centro de distriktoj;*

bulko — *frandaĵo el faruno kaj sukero;*

spuro — *postsigno;*

fuĝi — *forkuri por sin savi;*

eskapi — *liberigi sin per forkuro (el arestejo aŭ prizono).*

JUNA AMIKO

Internacia lernejana Esperanto-revuo

kvarfoje jare * formato A5 * 24-paĝa * dukolora preso * eldonkvanto 4500 * kontribuantoj el dudeko da landoj * legantoj en 40 * abunda varia enhavo didaktike verkita * simpla, alloga, vigla fidela amiko ankaŭ por la instruistoj * kontaktilo inter kaj lernantoj kaj klasoj * bonstila ilustrita * grupe partopreniga * aktoru skeĉojn * kune kantu * gajnu premiojn konkurse * solvu enigmojn * triumfu kvizse * spertiĝu Esperante!

Nia gazeto jam celebris sian kvindekajn datrevenon, sed restas eterne JUNAI

Eldonanto: Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Aŭspicianto: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Redaktoro: Stefan MacGill (Nov-Zelando/Hungario).

Perantoj en trideko da landoj.

Internacia peranto: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Jarabono: 8,40 gld.

En Bulgario abonoj pere de la poŝto aŭ pere de la peranto Liliya Koleva, bulv. „Cvjatko Radojnov“ 10, vĥ. B, 1527 SOFIA (jarabono: 2,40 lv.)



58-A INTERNACIA KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

Sarajevo, 29.07—05.08.1990.

ORGANIZANTOJ:

Savez za esperanto BiH

ORGANIZA KOMITATO:

D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo, Jugoslavio

tel. (071) 219—857, 34—400 (78)

ŽIRO RAČUN: 10196—678—885, Sarajevo, Savez za esperanto BiH

Temo: SPECIFECO KAJ PROBLEMOJ KOMUNIKAJ DE VIDHANDIKAPULOJ

Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino kaj Blindulasocio de Bosnio kaj Hercegovino invitas vin al 58-a IKBE, okazonta en olimpika urbo Sarajevo.

TROVU AMIKOIN!

Kastora Klubo estas Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco, al kiu apartenas infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj el 60 landoj.

Kastora Klubo helpas trovi korespondamikojn en aliaj landoj. Sufiĉas sendi al la klubo informojn pri familia kaj persona nomoj, naskiĝdato, sekso kaj intereso.

E-instruantoj, kiuj kunlaboras kun la Kastora Klubo ricevas senpage la kluban bultenon, kiu krom la informoj pri kluba vivo enhavas facilajn legaĵojn, versaĵetojn, kanzonetojn. Multaj E-instruantoj uzas ilin kiel instruhelpilojn.

Por pli detalaj informoj skribu al: Kastora Klubo, Pulawska 3—11, 02—515 Varsovio, Pollando.

INVITO AL SEFT 1990

Somera Esperantista Feria/Familia Tendaro

Tempo: 1990—08—18/25; **Loko:** Tendejo C/86 en la regiono Feldberg

Kondiĉoj: Memprizorgo (tendo, manĝo).

Ideo: Komuna tendumado de infanoj, familioj, junuloj, soluloj ktp. en esperantista etoso.

Programo: Migrado tra la arbaro- kaj lagoriĉa naturo, ekskursoj (unu ŝipekskurso), vesperaj kunvenoj, prelegoj, kantoj, fabelhoroj por infanoj ĉiuvespere.

Aliĝado: GDR-anoj devas skribi al: Zeltplatzvermittlung, Am Kietz 14. Waren 2060.

Eksterlandanoj povas aliĝi surtendeje. Krome **bonvolu sendi la aliĝilon al Werner Pfennig!**

Informoj: Werner Pfennig

Fohlenwinkel 13, Neubrandenburg GDR—2000

E-Asocio de GDR

RENKONTIĜO EN GDR

En la urbeto Brandenburg, situanta okcidente de Berlin en arbarplena kaj lagoriĉa regiono, ekde la 25-a ĝis la 27-a de majo 1990 GDREA okazigos sian Kvinan Centran Renkontiĝon (Landan Kongreson). Ĉiu esperantisto el ĉiu ajn lando estos bonvena. Entute ni atendas 200—300 partoprenontojn.

Dum la renkontiĝo ni diskutos novajn vojojn por la laboro de la esperantistoj de GDR, en konsidero de la ŝanĝiĝantaj kondiĉoj en nia lando, precipe pluan internaciigon.

Vin atendas riĉa, plene esperantlingva programo: prelegoj, diskutrondoj, seminarioj, kulturo, ekskursoj.

Tranoktado: turisma nivelo (komunaj dormejoj).

Prezo: ankoraŭ ne definitiva, c. 120,000 markoj (por partoprenontoj el nesocialismaj landoj: ĉirkaŭ 100,000 DM aŭ kontraŭvaloro en transpagebla valoro). Lernantoj kaj studentoj ĝuos rabaton.

Se vi ŝatus partopreni, skribu al Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080, GDR. Vi poste ricevos ekzaktan informilon kaj aliĝilon. Partoprenontoj el nesocialismaj landoj ricevos invitilon, kiu liberigos ilin de eventuala deviga monŝanĝo. Ni ne akceptos grupojn!

26-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La 26-a BKE okazos de la 6-a ĝis la 10-a de julio 1990 en Salvador.

PROGRAMO

Matene: Prelegoj liveritaj de invititaj eminentuloj de la Esperanta movado; ekzamenoj je la elementa, daŭriga, supera kaj porinstruista niveloj, fare de ILEI kaj BEL. Rapidaj kursoj por komencantoj.

Posttagmeze: Debatoj kaj laborkunvenoj, gvidataj de reprezentantoj de la diversaj ŝtatoj; perfektigaj kursoj; konversaciaj rondoj; kunsidoj de fakaj organizaĵoj en Esperanto; fermo.

Vespere: Malfermo; artaj vesperoj; la balo „Verdblanka”.

TEMO

Esperanto: Kulturo kaj Disvolviĝo

KONTAKTADRESO: Poŝtkesto 2550, 40021 — Salvador, Bahia, Brazilo

LETERVESPERO

Esperanta Klubo „Sub Verda Stelo” en Wałbrzych en majo 1990 organizos letervesperon. Nia adreso: Pola Esperanta Asocio, E-Klubo „Sub Verda Stelo”, ul. Broniewskiego 65 A, 58—309 WAŁBRZYCH, Pollando.



La intrigo

Marcos VASCONCELOS,
Brazilo

Prezidanto: Diru al Lia Ekscelenco, ke la popolo de mia lando estas kortuŝita pro tiu grava vizito kaj esperas ke lia restado en nia lando estos agrabla kaj profitiga, fortigante ankoraŭ pli la amikecajn rilatojn, kiuj kunligas la du fratajn patriojn.

Interpretisto: La Prezidanto bonvenigas vin kaj garantias, ke li mobilizos la tutan sekurecan aparaton por eviti atencojn kontraŭ Via Ekscelenco.

Vizitanto: Diru al via Prezidanto, ke mi dankas la prizorgojn, sed survoje de la flughaveno ĝis tiu ĉi palaco, mi observis kontraŭ mi nenian antipation kiu pravigus pli ampleksan mobilizon. Male, mi vidis la plej fratecajn demonstraciojn de la popolo, pro kio mi kortuŝite dankas.

Interpretisto: Lia Ekscelenco dankas viajn komplimentojn, redonas ilin kaj samtempe petas detalojn pri la sekurigaj procedoj.

Prezidanto: Ni estas plene protektataj de sekurigaj agentoj. Trankviligu Lian Ekscelencon — la popolo tute ne estas malamika al li. Ni ankaŭ rimarkis la plej sincerajn demonstraciojn de estimo survoje al tiu ĉi palaco.

Interpretisto: La Prezidanto bedaŭras informi al vi, ke la demonstracioj de sim-

patio rimarkitaj survoje al tiu ĉi palaco estis faritaj de soldatoj en civilaj vestoj, dank' al la speciala komplezo de la Ministerio pri Defendo. Li ankaŭ informas, ke li disponigis al vi du sekurecajn agentojn.

Vizitanto: Tiel, ŝajnas al mi ke du agentoj ne sufiĉas.

Interpretisto: Lia Ekscelenco ankoraŭ insistas pri la sekureca aparato.



Prezidanto: Diru al Lia Ekscelenco, ke tiu ĉi nacio estas tute sub la kontrolo de siaj estroj, kaj ke ni estas civilizita popolo, kiu respektas la ordon kaj leĝon. Iu ajn manifestacio kontraŭ honoraj vizitantoj, kiel Lia Ekscelenco, farita de apartaj individuoj, estos abortigitaj de kvindek specialaj agentoj. La timo de Lia Ekscelenco estas tute senbaza.

Interpretisto: La Prezidanto bedaŭras, sed ne po-

vas disponigi pli ol du agentojn. Sed li garantias, ke li liveros al Via Ekscelenco armilon por via persona protekto kaj la koncernan port-permeson.

Vizitanto: Tiukaze, kvankam konsternite, mi estas devigata peti personan protekton al la Ambasadado de mia lando.

Interpretisto: Lia Ekscelenco diris, ke li petos personan protekton al la Ambasadado de sia lando.

Prezidanto: Diru al Lia Ekscelenco, ke tia sinteno estos konsiderata kiel ofendo al mia popolo. Mi insistas, ke la timoj de Lia Ekscelenco estas tute senfundamentaj. Ni ne estas sovaĝuloj.

Interpretisto: La Prezidanto diris, ke estus pli bone ne plu efektiviĝi la oficialan programon, ol peti protekton krom tiun de la du agentoj.

Vizitanto: Mi konsideras tiun decidon kiel ofendon al mia lando. Ni venis en amika vizito. Ĝi ne plu daŭros!

Interpretisto: Lia Ekscelenco diris ke, tiel, la vizito ne plu daŭros.

Prezidanto: Do, tiu afero estos ekzamenata de la diplomaciaj aŭtoritatoj.

Interpretisto: La Prezidanto informas do al Via Ekscelenco ke, feliĉe, la por-do de eniro servas ankaŭ por foriro!

Tradukis: Aloisio SARTORATO
El „Kontakto”

KVINLITERVORTA KRUCVORT-ENIGMO

Horizontale: 1. La propra nomo de mondfama hungara Esperanta poeto kaj verkisto (1891—1967). 4. Institucio, societo, firmao dependa de alia ĉefa, metropola firmao, kaj anstataŭanta ĝin en alia loko. 10. Liteto de tre juna infano, ofte balancebla (radiko). 11. Leĝo aŭ kolekto de preskriboj, kiu enhavas normojn pri grava parto de la juro (en akuzativo). 12. Cilindroforma kuglego kun ogiva pinto, pafata de kanono kaj entenanta pulvoŝargon. 13. Alia nomo de nitrogeno. 14. Gaso verdete flava, kun forta sufokaodoro, uzata por blankigo, seninfektigo ktp. 15. Grekdevena vortelemanto, uzata en sciencaj terminoj, kun signifo „koloro”.

Vertikale: 2. Montara ĉeno inter Eŭropo kaj Azio. 3. Ano de ĉefgento, loĝanta en eŭropa lando. 5. Nomo de azia lando. 6. Floro de staŭdoj kun glavoformaj folioj, kun grandaj tri-nombraj floroj. 7. Elstara parto de tegmento, almetita super fenestro aŭ pordo por ŝirmi kontraŭ pluvo. 8. Helena dio de la riĉeco. 9. Hinduo dio de la milito, fulmo kaj pluvo.

Dimităr HAĜIEV

Noto de la Redakcio:

Limdato por alsendo de la solvoj ĝis la 15-a de junio 1990. La rezultoj kaj la nomo de la gajninto estos publikigitaj en n-ro 9/1990 de „BE”.



LA PREMIOJ

Bojana Josifova el Burgas ricevas libropremion — „De bordo al bordo” de Elisaveta Bagrjana, pro ĝusta solvo de la enigmo, publikigita en n-ro 12/1989 de „BE”.


La frazo estas: „Bulgara Esperantisto” jubileas!


En la sama numero ni publikigis ankaŭ la enigmon „Amikiĝis tri esperantistoj”. Ĝuste divenis ĝin Svetlana Pogorelaja el Kievo (USSR), kiu gajnas la alian libropremion — „Tango” de Georgi Karaslavov.

Solvo: Zoran estas instruisto kaj parolas francan lingvon. Ivan estas teknikisto kaj parolas italan lingvon. Georgios estas vendisto kaj parolas anglan lingvon.

Kapka Paunova el Sofio gajnas premion — gramofondiskon „Jubilea koncerto” de Veselin Damjanov pro ĝusta solvo de „Kolumnoj”, publikigita en n-ro 1/90. La titolo de versaĵo de L. L. Zamenhof estas: „Preĝo sub la verda standardo”.

Elkoran gratulon al la gajnintoj!





Deziras korespondi

BULGARIO

AKSINIJA ANTONOVA (24-jara veterinaro) — 35000 Berkovica, ul. „D. Filipov“ 48 — kun ĉi pri muziko, arto, kolekto bk.

GELERNANTA E-KLUBO (16—18-jaraj) — 3500 Berkovica, SPTUDGS „Emil Markov“ — kun samaĝuloj el ĉi.

IVANKA NAJDENOVA (21-jara instruistino) — 3500 Berkovica, ĵ. k. „Lenin“ bl. 4, vĥ. II, ap. 27 — kun ĉi pri muziko kaj literaturo.

IVETKA PENOVA (22-jara kudristino) — Pleven, ul. „Mara Denĉeva“ bl. 21, vĥ. VII, ap. 1 — kun ĉi pri poezio, turismo kaj folkloro.

RINA PAVLOVA (19-jara) — 1000 Sofio, ul. „11 aŭgusto“ 30 — kun ĉi pri ĉi.

BORJANA TODOROVA (37-jara sportistino) kaj Maria TODOROVA (40-jara konstrua inĝeniero) — 1231 Sofio, ĵ. k. „Nadejda“ VI, bl. 615, vĥ. V, ap. 64 — kun ĉi pri ĉi.

HUNGARIO

ESPERANTA GRUPO „AMIKO“ (14—15-jaraj) — H—3529 Miskolc, Dayka G. ut 4 — kun ĉi pri ĉi.

POLLANDO

BARBARA SOJKO (28-jara ĵurnalistino) — PL—15—827 Bialystok, ul. Wiatrakowa 30A — kun ĉi pri turismo, fotoarto, kolekto sondiskojn.

TADEUSZ BYSTRZYCKI (62-jara) — PL—30—505 Krakow, ul. Kaletnikow 13/3 — kun bulgaraj samideanoj pri filatelo, kolekto bildkartojn.

MARIUSZ KORZENIEWSKI (20-jara) — PL—09—213 Gozdowo, ul. Dworcowa 9, woj. plockie — kun bulgaraj samideanoj pri muziko, turismo, literaturo.

EWA NIZNIK (18-jara) — PL—31—276 Krakow, ul. Opolska 19/85 — kun ĉi pri fotoarto, kolekto bk.

BEATA MAZUR (27-jara instruistino) — PL—34—324 Lipowa, ul. Twardorzecka 88, woj. bielskie — kun

ĉi pri turismo, literaturo, muziko.

GEORGO TOMASZEWSKI (24-jara) — PL—38—535 Tyrawa Wol., Holuczkow 50, woj. Krosno — kun ĉi pri turismo, geografio, sporto kaj literaturo.

JOANNA MORAWIEC (29-jara) — PL—42—253 Janow, ul. Szkaina 4 — kun ĉi pri turismo, kolekto bk.

GRAZYNA GAZA (35-jara kosmetikistino) — PL—43—229 Pszczyna Cwiklice ul. Spokojna 5 — kun ĉi pri muziko, literaturo, kolekto bk.

DARIUSZ PLACZKIEWCZ (28-jara sukerajisto) — PL—91—429 Lodz, ul. I. Bema 55 m 6 — kun ĉi pri turismo, literaturo kaj kino.

SLAWOMIR SZCZYGIEL (27-jara) — PL—27—400 Ostrowiec, ul. Baltowska 323 A — kun bulgaraj esperantistoj pri muziko, literaturo, historio, geografio, sporto, turismo, fotoarto, kolekto bk.

RUMANIO

DORU NEAGU (juna instruisto) — 6100 Brailo, str. 30 Decembrie 1947, n-ro 2 — kun samideanoj el Japanio, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario pri ĉi.

SOVETUNIO

TANJA HERASIMENKO (22-jara) — SU—245110 Ŝostka, Sumska obl., ul. Karl Marks 22—49, Ukrainio — kun bulgaraj samideanoj pri ĉi.

ALGIS KASPIRAVIČIUS — SU—235370 Plukiai, regiono Paneveĵis, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

ANDREJ GALKIN (studento) — SU—141070 Kaliningrad, p/k 40 — kun ĉi pri ĉi.

E-GRUPO (9—60-jaraj) — SU—234520 Kapsukas, L. Angariechio 88A—9, Litovio, Janina Merijauskienė — kun ĉi pri ĉi.

NIKOLAJ KONOVALOV — SU—344064 Rostov—Dono, ul. Volokalamskaja 3/1 — kun ĉi pri speleologio.

JOLANTA MITUZAJTE (18-jara) — SU—235458 Akmenis raj., Venta, ul. Žemaičiu 39—78 — kun ĉi pri arto, kino, moderna muziko.

TATJANA ZEŽINA (28-jara) — SU—644046 Omsk—46, ul. Dekabristov 137—56 — kun ĉi pri popoltradicioj, muziko, kolekto bk, pm.

JOLANTA KULBYTE (lernantino) — SU—232010 Vilnius, Gelvonu 50—14, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

10-A INTERNACIA TURISTA PIEDMARŜO

Esperanto-societo en urbo Petriĉ organizas la 10-an tradician piedmarŝon sur la pitoreska kaj fabele bela Pirin-montaro. Ĝi okazos de la 11-a ĝis la 20-a de aŭgusto k. j. La partoprenantoj ĉi-jare kolektiĝos en la vizitinda urbeto Melnik kaj per buso vojaĝos al montodomo „Kamenica“. Ĉiutage oni piediros ĉirkaŭ kvar horojn. Dormado kaj manĝado, anticipe rezervitaj, okazos en montodomoj. Ĉiuj pagas la elspezojn ĉ. 90 levojn surloke. Aliĝkotizo: 10 levoj.

Aliĝoj estas akceptataj ĝis la 27-a de julio k. j. Adreso: Kiril Hleĥarov, str. „Goce Delĉev“ 8, BG—2880 Petriĉ, Bulgario.

Turisma Sekcio ĉe BEA rekomendas tiun belan aranĝon al bonaj turistoj-esperantistoj.

En la sovetia tagĵurnalo „Pravda“ (n-ro 12 de 12.I.1990) sub titolo „Insulo Esperanto“ estas publikigita intervjuo pri la centjara jubileo de Esperantomovado en nia lando kun bulgara esperantista veterano Ĥristo Gorov.

Vanga

Reage al la serio da publikaĵoj pri Vanga, en la Redakcion venis multaj leteroj. Homoj el diversaj mondpartoj komentas, rakontas pri aliaj similaj fenomenoj, petas helpon, insistas pri aperigo de la tuta libro ktp.

Multaj petas por si mem aŭ por parencoj kaj konatoj helpon kontraŭ diversaj malsanoj. Samideanoj el la regiono de Tomsk (USSR) demandas Vanga-n, ĉu ŝi vere aŭguris, ke pro eksplodo de atoma reaktoro en la Scienca Centro en Tomsk, en aprilo tiu urbo iĝos dua Ĉernobil. Ni transdonas la ricevitaĵajn leterojn al s-ino Krasimira Stojanova, kiu promesis informi Vanga-n pri ili kaj peti respondon.

Ĉi-numere „BE” publikigas leteron de brazila samideano kun etaj mallongigoj.

LETERO EL BRAZILO

*Goiânia, la 24-an de januaro 1990
Estimata s-ino Krasimira Stojanova,*

*festiĝis per ĝi, dum la korpo
estis viva, ne mortas.*

Kun granda intereso mi legis du artikolojn Viajn en la bonega E-revuo „Bulgara Esperantisto”, pri la mediu-mo Vanga. Laŭ tiu mallonga legado, mi sentas ke ŝi estas tre sentema al la spiritaĵ fortoj, ke ŝi estas forte ligita al spirite tre evoluintaj estaĵoj.

Tiu kapablo kaj manifestiĝo estas ofte neata de la oficiala scienco, ĉar la scienco estas konado kiu laboras nur kun elmontreblaj elementoj, kaj la vibrado de la spirito estas de naturo nekompreneble supera al la vibrado de la konkretaj kaj videblaj elementoj. Eble la ateistoj diros, aŭ dirus, ke tia fenomeno estas ebla, en la regno de la menso — ili dirus ke tio estas kapablo kaj afero de la menso, sed demandu s-inon Vanga kaj ŝi ne estos en akordo kun ĉi tiu ideo — ĉar ĝi havas originon multe pli altan. Ĝi estas fenomeno kiu



manifestiĝas tra la „menso”, kiu uzas la menson, sed ĝi mem ne estas provokata de la menso. Laŭ mia kompreno, ĝi estas tiel forta, ke ĝi povas registriĝi en la sentumoj, en la homa cerbo. Vere, fenomeno tia, kia estas Vanga, estas komprenebla nur por la inicitoj. „Ĉu la morta cerbo povas doni informojn”? La cerbo, sendube, mortas, la konscio, kiu mani-

La respondojn, kiujn ŝi ne donis al vi, ne estis pro manko de scio. Ŝi povas, ekzemple, viziti min, sen lasi sian domon, tio estas, ŝi povas viziti min en mia hejmo, paroli al mi, transdoni al mi mesaĝon, sed tio, kio venas, estas la senmorteca parto de la homa kreaĵo.

Mi kuraĝas peti de Vi tre specialan komplezon: mi petas vin transdoni al s-ino Vanga mian foton, kiu iras kune kun ĉi tiu letero, kaj, kiam ŝi tuŝos ĝin, ŝi eksentos mian vibradon kaj ekkomprenos min. Ŝi scios kion mi bezonas. Mi faras al vi ĉi tiun peton kun granda espero kaj mi estas certa, ke Vi ĝin plenumos.

Mi treege dankas al vi kaj al la redakcio de revuo „Bulgara Esperantisto”.

*Mi sincere salutas vin.
Jose Frauzino de SOUZA,
Goiânia — Go., Brazilo*

79B-14180

13

COMMERCIAL BUILDING CORPORATION

ТОВАРИЩЕСТВО ЗА СТРОИТЕЛСТВО

BULGARIA, 1618 SOFIA I T KABLESHKOV STR TEL 58 16 11 1 A. 80 23 21

044/71/497

2029

**KUNORDIGAS
KAJ REALIGAS
PERE DE SIAJ
ENTREPRENEJOJ
JENAJN AGADOJN:**

- *esplorado, projekciado kaj konstruado de turismaj objektoj en- kaj eksterlande;*
- *ekonomia gvidado en la sfero de internacia kaj enlanda turismo;*
- *partoprenado en konsorcioj kaj asocioj por komerca-industria kooperado, komuna konstruado kaj ekspluatado;*
- *importo kaj eksporto de meblaro kaj ekipaĵo por maraj kaj altmontaraj feriejoj, bankuracejoj, sport-sanigaj centroj, distrejoj, elektronamuzaj ludoj k. a.;*
- *liverado, muntado kaj ekipado de moveblaj ejoj por rapida manĝado;*
- *liverado, muntado kaj riparado de kaf-maŝinoj, frize-roj, mikro-ondaj bakujoj, postmiks-kaj koldringaparatoj k. a.;*
- *evoluiga kaj aplika agado rilate la produktadon de tegmentkonstruaĵoj kun multifunkcia aplikado, barmu-roj, pendigataj plafonoj, dekoraj murkovraĵoj, ĉarpent-feraĵoj kaj aliaj konstruproduktaĵoj.*

